

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹՈՒՔԱՆՅԱԻՐ
ՅԳՐՈՅՆԻՔՄՈՋԸՄՁ

Ĉi-numere legu pri:
**TRI KONCEPTOJ DE MERKATIKO
ZAMENHOFA TAGO EN ZAGREBO
ĈU VI KONAS ASTRID LINDGREN?
PAVAO RITTER VITEZOVIĆ
NELSON MANDELA (1918-2013)
LA DEC-ida JARO**

6
2013

Neven Mirzlečki koncertas
dum Zamenhofa tago en Zagrebo

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

Karaj legantoj, jen ni troviĝas ĉe la fino de ankoraŭ unu jarkolekto de nia gazeto. Kontentaj ni povas esti kaj pro la reguligita aperitmo, kaj pro la ĉiam pli kvalita enhavo, kiun ni dankas al niaj kunlaborantoj kaj legantoj. Apartan kontenton ni povas esprimi pro la du konsiderindaj mondonacoj ricevitaj ĉe la fino de la jaro. Se la abonkampanjo kiun ni lanĉas en ĉi tiu numero realigos niajn planojn pri 300 regulaj abonantoj, nia gazeto paŝos sur bona vojo kaj staros firma grundo. Helpu al ni pluvoji kaj firme stari, kiel tion jam multaj faris!

En la kroatia Parlamento troviĝas propono de nova *Leĝo pri asocioj*, kiu alportos multajn novaĵojn ankaŭ por enlandaj Esperantaj societoj. Opiniante ke tiu momento estas plej oportuna, konforme al niaj antaŭaj planoj ni publikigas la artikolon de Dennis Keefe pri merkatico, esperante, ke niaj aktivuloj povos lerni el ĝi ion utilan al la tuta Esperanto-movado.

Dokumenta Esperanto-Centro, kiu pluevoluas kiel landa Esperanto-arkivo, sed ankaŭ kiel grava motoro de la enlanda movado, proklamas la jaron 2014 "La DEC-ida jaro", celante intensigi la klopodojn por daŭra konservado de nia historia heredaĵo.

Raportante en tiu ĉi numero, ni akcentas la Zamenhoftagajn festojn, el kiu por la kroatia esperantistaro certe la ĉefa estis tiu, organizita de UZE en Zagrebo, la 13-an de decembro.

Homperdoj fariĝis neevitebla temo, ĉar dum mallonga periodo forpasis kelkaj gravaj personoj de la internacia movado, el kiuj ni nekrologas pri la redaktoro de "Literatura Foiro" Ljubomir Trifončovski, kaj la fondinto de AIS San Marino Helmar Frank.

Sed, malgraŭ la perdoj, la vivo iras antaŭen. Okazos novaj renkontiĝoj: MKR kaj MIRO, la unua eĉ kun kvaronjarcenta tradicio. En Pollando fondiĝis Centro por interkultura edukado, kiu dum nur kelkaj monatoj okazigis plurajn programojn por diversaj celgrupoj de neesperantistoj, pri kio ni raportas.

Literaturo estas nepreterpasebla temo, kaj do ni regalas vin per vivrakonto de svedino Astrid Lindgren, kaj per recenzo pri la rakonto de Marija Horžinek. Se vi ne povas vojaĝi reale, bonvolu viziti Srilankon almenaŭ legante artikolon de nia kunlaboranto. Kaj kun "Zagreba Esperantisto" vi vojaĝu tute reale ankaŭ en 2014. Ni bezonas vin kiel kunvojaĝantojn.

Sanon, kontenton, progreson kaj ĝojon en 2014, plenkore deziras al vi

NI SEMAS KAJ SEMAS KONSTANTE

 Radenko Milošević

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –
ni semas kaj semas konstante.*

Tiel skribis Ludoviko Zamenhof en sia poemo “La vojo”, aludante la obstinan laboradon, dum kiu multaj klopodoj restas sen frukto. Sed, se granda parto de niaj klopodoj rezultas nenian reagon en la komenco, aŭ se la rezulto ne kontentigas nin mem aŭ aliajn, tamen la sukceso dependas grandparte de konstanta “semado”. Oni do ne ĉesu semi dum malseka aŭ tro pluva jaro, ĉar neniu jaro estas ideala kaj perfekta. Ankaŭ dum la plej malfacilaj jaroj iuj semoj ĝermos kaj donos fruktojn. Kaj ĝuste en tiaj jaroj, eĉ la plej eta frukto pli gravas ol abundo da fruktoj en la riĉrikoltaj jaroj.

La mondo evoluas nur por la obstino de homoj, kiuj kreas ideojn kaj klopodas realigi ilin, malgraŭ kontraŭstaro de aliaj, malgraŭ ignorado, moko kaj ĉiaspecaj obstakloj.

Iom similan sorton havis nia revuo en la komenco. Kaj ankaŭ nuntempe, en sia matura aĝo, ĝi devas lukti kontraŭ diversaj malfacilaĵoj.

Anstataŭ sidi kaj pensi pri malfacilaĵoj, ni decidis plue trovadi solvojn kaj “semi” laŭ la instruo de Zamenhof. Ni daŭrigos eldonadi nian revuon ankaŭ en 2014. Eĉ pli grave: ni decidis, kun via helpo, karaj legantoj, atingi la nombron de 300 regulaj abonantoj, kio garantius ĝian senĝenan aperadon. Anstataŭ elspezi la monon de niaj sponsoroj por eldonadi la revuon, havante 300 abonantojn ni povus eluzi ĝin por aliaj

gravaj celoj: por organizi diversajn renkontiĝojn, eldoni librojn, gvidi kursojn, organizi informkampanjojn kaj aliajn aferojn, kiuj treege stagnas en nia movado ...

Ni invitas vin pensi sammaniere kiel Zamenhof: ni abonu kaj legu gazetojn, ĉar tiel ni pliriĉigas nian lingvoscion, profundigas nian kulturon, fariĝas kleraj kaj valoraj membroj de la esperantista komunumo. Malĝustas pensi, ke aliaj semos anstataŭ ni. Ni ĉiuj devas esti semantoj por havi bonan rikolto-sezonon!

Se vi legis pri diversaj eventoj pri kiuj ni skribis en “Zagreba Esperantisto”, vi povis kompreni, ke nia revuo estas pli ol simpla loka informilo, kiel sugestus ĝia titolo. Ĝi estas, kaj tia ĝi volas resti, periodaĵo kiu skribos pri Kroatio, sed ne nur pri ĝi, kiu skribos pri Esperanto, sed ne ekskluzive pri ĝi. “Zagreba Esperantisto” volas esti malferma por ideoj, libera por laŭdoj kaj kritikoj, ĝi ne volas fariĝi cenzurita organo de iu difinita organizaĵo, kvankam posedata de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj. Ĉirkaŭ “Zagreba Esperantisto” grupiĝas homoj, volantaj ĝui la etoson de Esperantujo en ĝia pura kaj origina formo. Ili volas evoluigi la Esperantan kulturon, sed ankaŭ la kulturon de dialogo, kaj kritiko se necese, sed kritiko argumentita, anstataŭ la kulturon de silentado kaj ignorado, kaj kritiko celanta forigi malsamopiniantojn. Nia rondo plivastiĝas per ĉiu nova leganto, abonanto aŭ kunlaboranto. Pro tio ni invitas vin diskonigi la informojn pri nia revuo, verki artikolojn, reagi pri la legitaj teksto kaj, antaŭ ĉio, partopreni en nia kampanjo por atingi 300 regulajn abonantojn. Renovigu vian jarabonon por 2014, kaj varbu viajn amikojn! Nia rondo de legantoj bonvenige akceptos vin!

JARABONO POR 2014 (6 numeroj)

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

pageblaj al konto de Dokumenta Esperanto-Centro Ĵurĉevac

HR5023600001102158381

aŭ

al konto *deoc-f* ĉe Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo

Zagreba Esperantisto

LINGVO ESTAS KIEL LOĜDOMO

 Valentin Melnikov

Lingvo estas kiel loĝdomo.


La propra – delonge kutima tiomgrade, ke oni ne rimarkas maloportunaĵojn. Vi bone scias, kie troviĝas kio, kaj – kiuloke kaj kiom forte necesas premi la pordon, ke ĝi korekte fermiĝu. Ankaŭ – kiel eviti kontuzon en malluma koridoro.

Fremda – ĉio estas ne tia, kia en la propra domo, kaj tio incitas, precipe pro bagateloj. Por ion trovi, necesas demandi mastrojn, kaj se fari tion tro ofte – ili nervoziĝos. Se vi provos serĉi mem – do la probableco trovi bezonataĵon estos negranda kompare kun la probableco trafi en embarason. Ne ĉiun gaston oni renkontas ĝoje.

Esperanto estas hotelo. Multe pli komforta, kaj oni ne bezonas mem zorgi pri aranĝo de tiu komforto. Povas ekloĝi ajna deziranto. Ne necesas adaptiĝi al fremdaj kutimoj.

Certe, hotelo ne povas esti via sola domo...

Latino estas ruino de antikva kastelo. Iam oni vivis ĉi




tie lukse – laŭ normoj de la epoko, kiam ne ekzistis elektro kaj multaj aliaj kutimaj por ni aferoj.

Toki Pona estas tendo aŭ branĉ-kabano. Principe, kaze de ekstrema neceso vivi eblas, sed...

Elpensitaj lingvoj el fantaziaj libroj kaj filmoj (**klignon, elfaj lingvoj** ktp.) estas kino-dekoraciaĵoj. Se fari ĉion bone – do sur ekrano ĝi aspektos kiel vera domo. Sed en realo estas nur unu farbita maldika vando...

Post apero de tiu teksto en mia blogo aliloke iu demandis: sed kio pri **Ido**?

Do, laŭ mi **Ido** estas malgranda hoteleto rande de urbo, for de publikaj busoj ktp. Tiu hoteleto estas konstante riparata kaj rekonstruata (certe, por plikomfortigo!) - do loĝantoj devas toleri polvon, odoron de farbo kaj aliajn neoportunaĵojn...



JARLIBRO DE UZE

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) eldonis, okaze de la ĉi-jara Zamenhofa tago, jam longtempe atendatan "Jarlibron 2013". Tiu eta, poŝformata, 48-paĝa libreto enhavas la plej gravajn informojn pri UZE. Ĝi komenciĝas per informoj pri UZE mem, pri ĝia fondkunveno kaj membroj-fondintoj. Sekvas historiaj faktoj pri la ideo de komuna organizaĵo de zagrebaj esperantistoj, dokumentoj pri fondo (protokolo) dokumentoj pri registriĝo, membro-statistiko, kroatingva versio de la statuto, statistiko pri la ĝisnunaj jarkunvenoj, laŭjara listo de plej gravaj aktivecoj (2007-2013), statistiko pri "Zagreba Esperantisto" kaj kontakteblecoj.

Papera eldono de la "Jarlibro 2013" estas aĉetebla ĉe:

zagreba.esperantisto@gmail.com

Prezo: 15,00 kunaĵoj.



LA DEC-ida JARO

Josip Pleadin

Antaŭ fondo de Dokumenta Esperanto-Centro, neniu en Kroatio sisteme okupiĝis pri kolektado de Esperantaj materialoj. En 2010, en Ĝurđevac estis fondita civitana societo kies ĉefa programcelo estas zorgi pri kolektado, konservado kaj uzado de Esperantaj materialoj, kaj ĝi fariĝis nacia Esperanto-arkivo.

Okaze de la Zamenhoftaga festo en Zagrebo (vidu pli detalan raporton en ĉi tiu numero), Dokumenta Esperanto-Centro eldonis statistikan superrigardon pri la jaroj 2010-2013. Temas pri A5-formata broŝuro (ricevebla ankaŭ en pdf-formato, senpage), kiu sur 56 dense presitaj paĝoj konigas al la publiko la tekston "Dokumenta Esperanto-Centro ne estu nur privata kolekto". En ĝi estas laŭmemore priskribita la evoluo de tiu ĉi kolekto antaŭ ol ĝi ricevis sian oficialan formon kiel DEC. La kolekto evoluis proksimume 30 jarojn, kaj nun ĝi estas nacia Esperanto-arkivo, kiu ĉiutage fariĝas pli riĉa.

En la dua parto de tiu broŝuro troviĝas listo de 448 donacintoj, kiuj inter 2010 kaj novembro 2013 kontribuis al DEC per sendo de Esperanta materialo.

La esploroj pri perdo de Esperantaj materialoj pro diversaj kaŭzoj, faritaj post la fondo de DEC, konfirmas la teruran statistikon. Dum la pasinta kvaronjarcento en Kroatio mortis ĉirkaŭ 350 geesperantistoj, kies forpaso estis iamaniere registrita. Temis preskaŭ senescepte pri personoj kiuj gvidis la societojn kaj estis kolonoj de nia movado en Kroatio, aŭ alimaniere estis konsiderataj gravaj aktivuloj, kaj kies forpaso estis registrita en gazetaraj nekrolojoj. Samtempe la nombro de societoj malkreskis de 42 (laŭ listo el 1987), al 20 en 2013.

Plejparto de Esperantaj materialoj de la malaperintaj societoj kaj forpasintaj individuaj esperantistoj aŭ perdiĝis, aŭ restis ie ĉe la familianoj en tre nekonvenaj lokoj. Familianoj kaj parencoj de forpasintoj ofte ne konas la valoron, nek scias kion fari rilate tiajn materialojn, kaj preskaŭ ĝenerale ripetiga forĵeto. Post la fondo de DEC komenciĝis iom pli celkonscia sistema kolektado de tia materialo.

Dum la Zamenhoftaga festo en Zagrebo, DEC proklamis la jaron 2014 "*La DEC-ida jaro*". Kion signifas tiu nomo?

Finfine DEC volas entrepreni decidajn paŝojn, kaj dum 2014 intensigi serĉadon kaj kolektadon de materialoj dissemataj ĉe familianoj kaj parencoj de forpasintaj esperantistoj, aŭ trovi la arkivojn de malfonditaj societoj por ordigi kaj konservi ilin.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn de Kroatio informi nin pri kontakteblecoj al parencoj de forpasintaj esperantistoj, aŭ eĉ al vivantaj maljunaj esperantistoj kiuj volus donaci siajn materialojn

al vere tukroata kolekto. Bonvolu pri tio informi dec.kroatia@gmail.com kiu entreprenos ĉiujn necesajn paŝojn por starigi kontaktojn kun tiuj personoj, organizi senpagan transporton, registradon de donacoj laŭ kutima maniero de DEC (akurate en sia retejo, kaj ĉiujare en la presita raporto) kaj disponigon al potencialaj uzantoj sub ĝenerale konataj kondiĉoj de DEC.

DEC atentigas, ke libroj en Esperanto, kutime konsiderataj plej valora materialo, valoras malpli ol fotoj, leteroj, gazetoj kaj aliaj ofte senorde amasigitaj paperaĵoj. Do, DEC ne serĉos nur librojn, sed ĉian alian materialon kiu rilatas al esperantistoj kaj ilia laboro. Ni petas vin konservi ankaŭ sonkasedojn, filmojn, fotojn, notlibrojn, leterojn, gazeteltondaĵojn, protokolojn, membrolistojn ktp.

Se vi trovas tian materialon, bonvolu lasi al DEC la eblecon selekti kaj ordigi ĝin, ĉar ni havas multjaran sperton pri tio.

En 2014 ni ĉiuj estu DEC-idadaj agi, pore ke nia komuna nacia arkivo plukresku.



DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO (2010-2013)

**Serio:
"DEC-aj kajeroj" n-ro 1**

Statistiko pri ekesto kaj evoluo de la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio.

Mendebila ĉe:
dec.kroatia@gmail.com

Prezo:
30,00 kunaĵoj / 4,00 eŭroj

Omaĝe

AFRIKA MONUMENTO MONDSKALE REKONATA

NELSON MANDELA

1918-2013

GBEGLO Koffi


La 5-an de decembro 2013 la tuta mondo informiĝis pri la forpaso de *Nelson Mandela*, eksprezidento de Sudafriko. Lian morton anoncis la nuna sudafrika prezidento Jacob Zuma kiu diris, ke Mandela en sia hejmo mortis "pace", ĉirkaŭita de sia familio. Jacob Zuma anoncis ankaŭ la organizon de ŝtata funebro, petante ke la sudafrikaj flagoj estu duonhisitaj ekde la 6-a de decembro ĝis post la entombigo. Ne nur en Sudafriko okazis tiel, sed en preskaŭ ĉiuj landoj afrikaj kaj eĉ eksterafrikaj. Tio estas signo, ke la forpasinta Nelson Mandela gravas por la tutmonda komunumo. Lian funebran ceremonion partoprenis la tuta internacia komunumo kun multaj homoj el kiuj citindas Banki Moon, la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Barack Obama, la prezidento de Usono, François Hollande, la ŝtatestro de Francio, afrikaj ŝtatestroj, diverslandaj ĉefministroj, eksprezidentoj, ministroj, ambasadoroj, ktp. Mandela estis tiel unuanime

honorita pro sia tutviva lukto por la homaro (lukto kontraŭ rasismo kaj batalo por elradikigo de aidoso).

Naskiĝo kaj studado

Li naskiĝis 18-an de julio 1918 kiel *Rolihlahla Mandela* en reĝa familio *Thembu Xhosa* de la vilaĝo *Qunu* apud la rivero Mbashe en Transkei (Cap-Oriental). Lia patro estis *Hendry Mphakanyiswa Gadla*, estro de la tribo de *Tembu*. Sepjara *Rolihlahla Mandela* ekvizitis lernejon, kaj tiel fariĝis la unua ano de sia familio kiu eklernis legi kaj skribi. Instruisto en la lernejo donis al li la okcidentan nomon *Nelson*. Nelson aĝis 9 jarojn, kiam lia patro mortis pro tuberkulozo. Li devis daŭrigi la lernadon ĉe la misiistoj de *Wesleyan*. Laŭ la kutimo Xhosa, li iniciiĝis je sia deksesjariĝo kaj poste daŭrigis sukcese sian studadon en la lernejo *Clarkebury Boarding Institute*. Tie ĉi li diplomiĝis post du (anstataŭ post tri) jaroj.

En 1934 *Nelson* enskribiĝis en la kolecion *Wesleyan de Fort Beaufort*. Diplomiĝinte, li studiĝis en la universitato de *Fort Hare*. Tie li konatiĝis kun *Oliver Tambo*, kiu poste fariĝis lia kunluktanto. Fine de la unua studjaro en la universitato, al li estas malpermesite daŭrigi la lernadon, ĉar li partoprenis en bojkotado de la universitata regularo. Li fuĝis



al **Johanesburgo**. Per koresponda kurso li sukcesis fari la licencian ekzamenon de la **Universitato de Sudafriko (UNISA)**. Tuj poste li eklernis juron en la universitato de **Witwatersrand**.

Kariero kaj politiko

Nelson Mandela fariĝis advokato en sia lando. En 1942 li fariĝis membro de la politika partio ANC (Afrika Nacia Kongreso). Li tiel havis la rolon lukti kontraŭ la politika dominado de la blankula malplimulto. En 1944 Mandela kune kun **Walter Sisulu** kaj **Oliver Tambo** fondis la junularan sektion de ANC. La ĝeneralajn elektojn de 1948 gajnis la partio de la blankuloj. Jen do ili starigis novan politikan sistemon kun la nomo **Apartheid** (apartismo). Estis malfacile al la advokato Mandela toleri tiun rasisman sistemon. En 1952 li ekagis kontraŭ ĝi, luktante kontraŭ la registaro de **Daniel Malan**.

En 1955, kiam la partio de la blankuloj pretigis sin por iĝi eterna reganto de la lando, **Mandela** partoprenis planon por malstabiligi la apartisman sistemon kaj lukti kontraŭ la rasismo en la lando. Tiam **Tambo** kaj **Mandela** uzis siajn laborejojn por disponigi senpage konsilojn kaj jurajn klarigojn al malriĉegaj nigruloj. La 5-an de decembro 1956 **Mandela** kaj aliaj 150 personoj estis arestitaj kaj akuzitaj je perfido. Finfine kun la helpoj de advokatoj kaj sudafrikaj tribunaloj, tiuj personoj estis liberigitaj en 1961. Antaŭ tio, en 1960, okazis masakroj en **Sharpeville**, kie mortis 79 nigruloj kaj 178 estis vunditaj. La gvidantoj de ANC estis devigataj anstataŭigi la pacan lukton per malpaca. Jen do la partio estis malpermesita kaj la gvidantoj enkarcerigitaj. **Nelson** fondis la reton "**Umkhonto we Sizwe**" por akceli la malpacan lukton. Diveneblas kio okazis poste al li.

De karcero al palaco prezidenta

En 1962 Nelson estis arestita kaj en 1963 kondamnita resti en malliberejo dum kvin jaroj, ĉar dum proceso li kontestis la apartisman sistemon. Pro siaj

kaŝaj ANC-agado kaj lukto kontraŭ la tiama reĝimo en Sudafriko, li estis denove kondamnita en 1964, sed ĉi-foje je dumviva restado en malliberejo. Kun la paso de la tempo li fariĝis la plej fama kaj unu el la plej malnovaj politikaj malliberuloj.

La 7-an de decembro 1988 li estas parte liberigita kun kontrolita rezidejo. La 5-an de julio 1989 li renkontiĝis en **Kaburbo** kun la tiama sudafrika prezidento **Pieter Botha**. Li estas definitive liberigita la 11-an de februaro 1990 dank' al la tiama sudafrika prezidento **Frederik de Klerk** kiu, pro politikaj kialoj, finigis la kaŝan agadon de ANC, kaj de tiu ĉi petis kunlaboron por establi civilan pacon en la tuta lando. Jen do ANC estas libera agadi kaj tial partopreni la baldaŭajn elektojn.

La 27-an de aprilo 1994 okazis la unuaj demokrataj elektoj en Sudafriko. La partio ANC grandskale venkis. **Nelson Mandela**, la tiama gvidanto de la partio, fariĝis prezidento de Sudafriko kaj la 10-an de majo 1994 ĵuris en **Pretorio** antaŭ la tutmonda politika elito. Ekde tiam li gvidis la unuan nerasisman registaron de Sudafriko. Temas pri la registaro de tutlanda unuiĝo el **ANC**, **La Nacia Partio** kaj la partio de **Zoulou Inkhata**. La du vic-prezidentoj de Nelson estis **Thabo Mbeki** kaj **Frederik de Klerk**. Dum Nelson

okupiĝis pri la ŝtatestraj taskoj, tiuj de ĉefministro estis konfeditaj al **Thabo Mbeki**. La repaciĝo de la tuta lando estis lia ĉefa zorgo.

Li fondis komisionon "**Vero kaj Repaciĝo**", kies rolo estas noti ĉiujn politikajn malbonojn faritajn dum la apartisma regado. Tute ne temis pri juĝado de iuj, ĉar ne nur la apartisma registaro faris malbonon, sed ĉiuj politikaj partioj. La celo estis ke ĉiuj nur konu la malbonajn agojn, por ke ili ne plu ripetigu en la estonteco. Tio estis tre grava por starigi la pacon en la lando. Nelson faris eĉ plian paŝon tiudirekten. Li iris al **Orania** por tie renkonti **Hendrik Verwoerd** kaj organizi festeton, kiun partoprenis la edzinoj de la antaŭaj sudafrikaj ĉefministroj kaj prezidentoj kune kun la edzinoj de la malnovaj malliberuloj de **Robben Island**.

Internaciskale, li tiel igis sian landon bona ekzemplo de repaciĝo. Liaj pliaj pacigaj paŝoj koncernis aliajn afrikajn landojn.

En la jaro 1996 la Nacia Partio forlasis la registaron post adopto de nova konstitucio. La sekvan jaron Mandela ĉesis esti prezidanto de ANC, kaj lin anstataŭis **Thabo Mbeki**. Tial en 1999, ne **Nelson** sed **Meki** fariĝis la nova prezidento de Sudafriko. Sed tiel ne finiĝis la klopodoj de Nelson por la sudafrika popolo kaj ankaŭ



→ por la homaro.

Klropodoj ekster la politikaj terenoj

Por daŭrigi la laboron, Nelson kreis la *Fondaĵon Nelson Mandela*. Liaj samlandanoj kritikis lian regadon, asertante pri preskaŭ nenia agado kontraŭ aidoso, nek konkreta agado favoranta nur nigrulojn. La kritikantoj deziris, ke la nigruloj post fiasko de apartismo regu ĉion kaj superregu la blankulojn, kio tute ne estis la idealo de Nelson. Lia ambicio estis starigo de egalrajteco inter la nigruloj kaj la blankuloj.

Intertempe li ekcedziĝis de *Winnie*, kaj reedziĝis al *Graça Machel*, vidvino de *Samora Machel*, la eksprezidento de Mozambiko. En februaro 2003 Mandela deklaris, ke Usono estas "minaco kontraŭ la paco en la mondo", kaj ke la prezidento *George W. Bush* deziris "tremi la mondon en holokaŭston". Li tiel akuzis la tiaman usonan prezidenton, ĉar li ignoris la Unuiĝintajn Naciojn. En septembro 2004 la sudafrika popolo elektis lin la *Unua personeco de la lando*. Poste Nelson dediĉi sin al la elradikiĝo de aidoso.

La 6-an de januaro 2005 Nelson publike anoncis la morton de sia 54-jara filo *Makgatho Mandela* trafita de aidoso. Li tiel faris por montri, ke estas tempo por rompi la tabuon ĉirkaŭ aidoso.

Sciindas, ke multaj gravuloj kaj politikuloj perdis samfamilianojn pro aidoso, sed kaŝis tion, ĉar la malsanon ili konsideris kiel honton. Ofte la personoj trafitaj de aidoso estis forĵetitaj de siaj parencoj kaj tial kondamnitaj morti solaj kaj izolitaj. Lia agado de Mandela iris ankaŭ ekster la kampo de aidoso, kaj celis atingi liberigo de afrika popolo el diktaturaj reĝimoj. En 2007 Mandela klopodis konvinki la prezidenton de Zimbabvo *Mugabe*

forlasi la povon "kun minimumo da digno", antaŭ ol esti "persekutita kiel la malnova diktatoro Augusto Pinochet", sed *Mugabe* ne volis cedi. En junio 2008, ĉe la kulmino de la prezidentelekta krizo en Zimbabvo, Nelson kondamnis la "tragikan fiaskon de lia regado".

Dank' al iniciato de la miliardulo *Richard Branson* kaj la muzikisto *Peter Gabriel*, la 18-an de julio 2007 *Nelson Mandela*, *Graça Machel* kaj *Desmond Tutu* organizis asembleon de influhavaj mondaj gvidantoj, kiuj ŝatus uzi siajn spertojn por solvi la plej urĝajn problemojn de la planedo. Dum la festo pri la 89-a datreveno de sia naskiĝo, Nelson faris paroladon, en kiu li menciis pri la starigo de la konsilantaro de *Global Elders* (la universalaj saĝuloj). *Desmond Tutu* estas la prezidanto de la konsilio, kaj la aliaj membroj-fondintoj *Kofi Annan*, *Ela Bhatt*, *Gro Harlem Brundtland*, *Jimmy Carter*, *Li Xiaoxing*, *Mary Robinson* kaj *Muhammad Yunus*. Mandela klarigis ke "tiu grupo povas libere kaj kuraĝe paroli, traktante publike aŭ neformale ĉiajn aferojn. Ni laboras kune por subteni la kuraĝon tie, kie estas la timo, por kuraĝigi la interkonsilintojn tie, kie estas konfliktoj, kaj esperigi tie, kie estas malespero".

Mandela ĉiam subtenis agadon favoranta la pacon en sia lando kaj ekster ĝi. Tial dum la elektoj en 2009 en Sudafriko, kiam aperis skismo ene de ANC, li preferis la grupon de *Jacob Zuma* ol tiun de kunlaborintoj de *Thabo Mbeki*. Li memorigis la partion ANC pri ties celoj: "lukto kontraŭ la malriĉeco kaj la starigo de socio unuigita kaj nerasisma".

Honoroj kaj ordenoj

Tra la tuta mondo la agado de *Mandela* ricevadis aplaŭdon. Jam en 1979 li ricevis la *Premion Nehru* por la paco. En

1993 la Nobelpremio por la paco estis donita al li kun la prezidento *Frederik de Klerk*. La *Premion Ambasadoro de la Konscienco de Amnestio Internacia* li ricevis en 2006. Unu jaron poste, en 2007, la prezidento *Bush* komparis la situacion en Irako kun tiu de Sudafriko, kaj akuzis *Saddam Hussein* pri la kaoso en Irako, aludante, ke *Saddam* malhelpis aperon de paciganto en Irako kia estis Nelson en Sudafriko. Li tiam diris: "Nelson Mandela mortis, ĉar *Saddam* mortigis ĉiuj *Mandela*-ojn". Li tiel rekonis la gravan rolon de Nelson, kian neniu alia povis havi en Irako. Sudafrikanoj konscias pri tio. Tial la 90-a datreveno de la naskiĝo de Nelson la 18-an de julio 2008 estis celebrata tra la tuta lando kun koncerto omaĝe al *Hyde Park* kadre de koncertaro 46664, kies nomo fontas el la mallibereja numero de *Mandela*. La plej grandan omaĝon al *Nelson* li mem ne povis vidi, ĉar ĝi okazis post lia morto.

Eterne silentas la tigro

Sabaton, la 8-an de junio 2013 la sudafrikaj prezidentaj instancoj anoncis, ke la eksprezidento *Nelson Mandela* estas enhospitaligita pro pneŭmonio, kaj lia vivo estingiĝis la 5-an de decembro 2013.

La prezidento de Sudafriko *Jacob Zuma* devis anonci la forpason de la Majstro, kaj tiu novaĵo tremigis la tutan mondon. Apartan diskutrondon pri la vivoj de *Mandela* kaj *Zamenhof* okazigis la *Instituto Zamenhof* en Togolando, dum la 21-a Togolanda Esperanto-Kongreso la 20-an de decembro 2013. Tra la tuta Togolando la flagoj estis duonhisitaj dum pli ol unu semajno, samkiel ankaŭ en aliaj landoj. Nun ĉiu sin demandas, kiam aperos alia *Nelson Mandela* en la mondo, kaj aparte en Afriko, kiu nun suferas pro la diktaturoj de siaj gvidantoj.

VIZITE AL KRIŽEVCI ANTAŬ DU JARDEKOJ

 Radenko Milošević

Pasis du jardekoj post kiam, je la nomo de Zagreba ekonomia ĉambro, mi vizitis la urbon Križevci kaj ĝian estraron. Ĝi estis la tempo de terura milito, kaj veturinte al Križevci, mi estis konscia pri neagrable kaj streĉa situacio miarilate, kio konfirmiĝis kiam la urbestro anoncis mian paroladon. Ĉe la komenco mi tuj prezentis mian scion pri la urbo: *Kun granda plezuro mi venis en vian urbon Križevci. Nome, via urbo estas unu el la plej elstaraj kaj gravaj kroataj urboj, la urbo de kroatia kredo kaj fido, kaj la "nesto" (alivorte: naskiĝurbo) de iuj elstaraj kroataj granduloj. Ĝi estas, antaŭ ĉio, la urbo de Sankta Marko de Križevci kaj de la t.n. "Sanga parlamento de Križevci".* Tiutempe en mia parolado mi akcentis la ekonomi-politikan situacion. Sed nun ... Eble nun estas la ĝusta momento por diri tion, kion mi ne diris antaŭ dudek jaroj. Pri Sankta Marko de Križevci kaj pri la Sanga parlamento de Križevci mi ne ripetos la detalojn, ĉar pri ili "Zagreba Esperantisto" skribis en sia numero 1(21)/2013.

Tamen, menciindas multaj personoj kies nomoj ligiĝas al Križevci, ekzemple:

- la unua kroatia piloto **Karlo-Dragutin Novak**, pri kiu "Zagreba Esperantisto" skribis en la numero 1(12)/2010,

- la poeto, politikisto, botanikisto, geologo, arkeologo kaj unu el la elstaraj personoj en la kroatia nacia kaj popola renaskiĝa "Ilira movado", **Ljudevit Farkaš Vukotinović**,

- la gardanto de la ŝtata sigelilo kaj la t.n. ĉefa reĝlanda notario **Ivan Zakmardi**,

- la unua kroatia koncertkantistino kaj opera primadono **Sidonija Erdődy Rubido**

- kaj la inventisto, "mirinda infano" kromnomita

"sciencisto en mallonga pantalone", la nobelo **Marcel Kiepac**.

Tre grava parto de la vivo de **Ljudevit Farkaš Vukotinović** estis ligita al Križevci, en kiu ekestis liaj plej gravaj verkoj. Jam dum sia studado en Požun (la nuna Bratislavo) li amikiĝis kun la plej konataj reprezentantoj de la "Ilira movado": **Ljudevit Gaj**, **Dimitrije Demetar**, **Dragutin Rakovec**, **Janko Drašković** kaj aliaj. Kiam komencis aperadi la gazeto "Novine horvatske" (= Kroata gazeto), jam en 1835 en la gazeta suplemento "Danicza Horvatzka, Slavonzska y Dalmatinszka", estis publikigita lia patriota poemo kun la unua verso: "Heroumu malgranda pugno". En la jaro 1836 li translokiĝis al Križevci, kaj iĝis deputito de Križevci en la Kroata Parlamento. En 1847, en la Parlamento li parolis pri la nepreco enkonduki la kroatan lingvon kiel oficialan, kion poste subtenis per sia parolado **Ivan Kukuljević Sakcinski**. Post la falo de la t.n. "Absolutismo de la banuso Bach", en 1860-1867 li estis membro de la Banusa konferenco kaj estro de la Departemento de Križevci. Ĝis la fino de sia vivo li estis parlamentano. Li estis membro ankaŭ de la tiama Jugoslavia akademio pri sciencoj kaj artoj.

Ivan Zakmardi estis naskita en Križevci komence de la 17-a jarcento. Post la studado ĉe la jezuitoj en Zagrebo kaj alie en Aŭstri-Hungara Monarkio, kiel sperta juristo kaj humanisto li okupis tre elstarajn postenojn en la administrado de la lando. Reveninta al Kroatio li fariĝis advokato de la Zagreba episkopejo kaj la nobela juĝisto en la Departemento de Križevci. Kiel ĉefa reĝlanda notario li ordonis konstruon de la t.n. Kesto de privilegioj (kroate: *Škrinja privilegija*) por la plej valoraj ŝtataj dokumentoj. Per tio komenciĝis la Kroatia ŝtata arkivo. Por la Kesto

li verkis latinlingvan poemon pri kroatia ŝtata juro, kaj en la lastaj versoj li menciis tri riverojn (Kupa, Sava kaj Drava), la riverojn kiujn en la batalo kontraŭ Turkoj, per malespera defendo kaj per grandegaj viktimoj, Kroatio sukcesis konservi.

Per kio rilatas al Križevci **Sidonija Rubido Erdődy**, naskita en Zagrebo en 1819? Ŝia tomba troviĝas en Gornja Rijeka en la Departemento de Koprivnica-Križevci. Tamen ŝian ligitecon al tiu parto de Kroatio prezentas ankaŭ la kurteno "Kroatia popola renaskiĝo" en Kroatia nacia teatro, la pentraĵo de **Vlaho Bukovac**, sur kiu ŝi staras tuj apud Ivan Kukuljević Sakcinski. Ŝi famiĝis ĉar jam 14-jaraĝa ŝi kantis la vekkanton de **Ljudevit Gaj** "Kroatio ankoraŭ ne pereis" (=Joŝ Hrvatska ni propala)! Ŝi estis la unua kroatia koncertkantistino kaj primadono, kiu apud aliaj roloj kantis la ĉefrolon de Ljubica en la opero de **Vatroslav Lisinski** "Amo kaj malico" (kroate: Ljubav i zloba) en 1846. Politike ŝi estis kontraŭ la reĝimo de la banuso Khuen-Hédervary. Dum la lastaj dudek jaroj, ĝis la morto en 1884, ŝi vivis en la Departemento de Koprivnica-Križevci, kie ŝi plenkore helpadis al kamparanoj.

La nomon de la nobelo **Marcel Kiepac** mi jam menciadis en miaj artikoloj, sed mi starigas al mi la demandon: Ĉu li ne meritas pli grandan artikolon? Mi trovis jesan respondon al mia propra demando en lia juneco kaj geniece. Sed tion mi lasu por iu alia artikolo.

Se vi, karaj (junaj) legantoj, volas konatiĝi kun Križevci ankaŭ persone, kiel mi faris antaŭ dudek jaroj, jen bona okazo: la loka Esperanto-societo "Estonteco" organizos somere de 2014 porjunularan aranĝon MIRO. Pri ĝi legu aliloke en ĉi tiu numero de "Zagreba Esperantisto". Kaj salutu Križevci tiuokaze!

ATENDANTE NOVAN LEĜON PRI ASOCIOJ

Redakcia kompilo

En demokrataj socioj, kiuj proklamas homajn kaj civitanajn rajtojn, la neeviteblan parton konsistigas ankaŭ diversaj formoj de asociiĝoj. Kutime tiajn formojn oni nomas (civitanaj) asocioj, kaj plejparte temas pri senprofitaj organizaĵoj.

Asocio, laŭ sia difino, estas ĉia formo de libera kaj memvola asociiĝo de fizikaj aŭ juraj personoj, sen profitaj celoj. En Kroatio tiu temo estis regulita per *Leĝo pri asocioj* el la jaro 2001, sed tiu leĝo nepre bezonas ŝanĝojn. Tion ŝajne komprenis ankaŭ la registaro de Kroatio, kaj la propono de nova *Leĝo pri asocioj* jam troviĝas en la parlamenta proceduro. Laŭ informoj troveblaj en mediatoj, ĝi devus esti adoptita en la unua jarkvarono de 2014.

En Kroatio funkcias speciala *Oficejo por asocioj de la registaro de Kroatio*, kies aktuala estro estas s-ro **Igor Vidaček**. Tiu oficejo, verŝajne kiel preparon por proceduro de adopto de la nova leĝo, meze de 2013 eldonis specialan broŝuron, kiu donas pli da konkretaj informoj pri asocioj en Kroatio.

Laŭ la *Leĝo pri asocioj* el 2001, asocion en Kroatio povas fondi minimume tri fizikaj aŭ juraj personoj.

Se asocio volas havi juran personecon, ĝi registriĝas en la *Registro de asocioj de Respubliko Kroatio*, kiun gvidas oficejoj de la ŝtata administracio en la teritorio de regiona memadministrado.

En majo 2013 en tiu Registro estis notitaj pli ol 49.000 asocioj, el kiuj certe multaj ne funkcias, ĉar ne ekzistas aŭtomata eksregistriĝo de nefunkciantaj asocioj el la Registro. Laŭ tiu

statistiko, en Kroatio je ĉiuj 88 loĝantoj funkcias unu asocio. Plej multaj asocioj estas sportaj (34,01%) kaj kulturaj (15,16%).

La samaj asocioj, se ili ne havas profitajn celojn, devis registriĝi ankaŭ en la *Registro de senprofitaj organizaĵoj*, establita en 2009 ĉe la Ministerio pri financoj. En majo 2013 en tiu Registro estis notitaj 21.318 senprofitaj asocioj.

Laŭ siaj statute preskribitaj aktivecoj, Esperanto-societoj apartenas al kulturaj asocioj. En 2011, plej multe da mono el la Ŝtata buĝeto ricevis sportaj asocioj (25,01%), kaj la kulturaj troviĝas en la tria loko (19,51%).

Dum oni atendas ekvalidon de la nova *Leĝo pri asocioj*, en decembro, sen granda pompo, komencis aperadi la kroatlingva periodaĵo "*Udruga.hr*", kiu estas "gazeto por prezidantoj kaj aliaj respondecaj personoj en asocioj". Verdire, manko de tia periodaĵo sentebliis jam delonge, ĉar respondeculoj de asocioj plejparte estas volontuloj,



kiuj ne povas ĝustamaniere konatiĝi kun preskriboj de komplikaj validaj leĝoj kaj reguloj. Sekve, la asocioj balancas en ia vakuo, neprecize sciante kio estas laŭleĝe permesata, kaj kio povas esti interpretata kiel punebla krimo. Malgrandaj asocioj, sekve ankaŭ Esperanto-societoj estis en aparte malavantaĝa pozicio, ĉar burokratado atingis la nivelon, kiam ĝi sufokis la ceteran laboron.

La nova gazeto per pluraj artikoloj konigas al ni multajn sciindaĵojn. Ĝi aperados 8-foje jare, kaj ĝin nepre abonu niaj societoj, se ili volas ricevi fidandan informon kun prezentitaj ekzemploj. La unua numero estis sendita al asociaj funkciuloj en pdf-formato, reklamcele. Se iu el vi ne vidis ĝin, nia redakcio volonte sendos al vi ĝian elektronikan kopion.

Analizante la ricevitajn unuan numeron, ni konstatas, ke en ĝi troviĝas pluraj interesaj tekstoj. Enkonduke, la intervjuo kun s-ro Igor Vidaček, ĝenerale parolas pri asocioj, ilia signifo por ĉiu demokrata socio, kaj pri la nova leĝo. Aliaj artikolaŭtoroj skribas pri intereso de asocioj



atingi transparentecon de sia laboro (*Zorislav Antun Petrović*), pri asocioj kiel faktoroj de konserveblaj sociaj ŝanĝoj (*Gojko Bežovan*), pri uzado de financoj el la programoj de Eŭropa Unio (*Mirjana Fijolić*), pri detala prezento de novaĵoj kiujn alportos la nova Leĝo pri asocioj (nepre legebla, ĉar ĉiuj asocioj devos adaptiĝi al novaj reguloj!), pri la problemoj rilate la novan leĝon (burokratizado, financado de asocioj kaj la ŝtata kontrolo), pri konsiloj por efike gvidi asociojn (*Saša Petar*, *John Lodder*), kunvenoj (*Mila Žilavec*) kaj administrado de asocio, reklamado (*Olga Štajdohar-Pađen*), volontulado (*Božo Prelević*), membreco en asocioj (*Marija Butković*), honorarioj kiujn pagas asocioj (*Sandra Mihelčić*), profesiuloj kaj ilia postenigo (*Daniel*

Sever), sponsorado kaj donacoj kun ekzemploj de necesaj kontraktoj kaj fakturoj (*Igor Milanović*), pri la novaj reguloj rilate la financojn kaj kontadon, pri akirado de kreditoj por asociaj celoj, komerca agado de asocioj, neceso registriĝi kiel paganto de AVI (aldonvalora imposto) enlande kaj en Eŭropa Unio (*Milivoj Friganović*), pri manieroj proklami bankroton de asocio (*Božo Prelević*), publikrilatoj de asocioj (*Hedda Martina Šola*), gvidado de asocio (*Nataša Rupčić*), organizado de turisma kaj ekskursiva aktiveco kaj multaj aliaj temoj, inkluzive de tre klara prezento de monpunoj por respondeculoj kaj asocioj pro diversaj malobeoj de la leĝo.

La eldonisto de la gazeto estas *Centar za menadžment i*

savjetovanje (Centro por manaĝerado kaj konsilado) el Zagrebo, 1. Gajnički vidikovac 5, kaj la redakcio estas kontaktebla per telefono 01/49 21 742 kaj reto: urednistvo@ripup.hr

Abonkotizo por 8 numeroj aperontaj en 2014 estas 295,00 kunaĵoj. Ni konsilas al ĉiuj Esperanto-societoj aboni ĝin.

Dezirinde estus por kroatiaj Esperanto-aktivuloj kiel eble pli urĝe organizi specialan seminarion por konatiĝi kun la estonta funkciado de niaj asocioj. Ne nur pro la novaj leĝoj, sed ankaŭ por doni impulson al tiuj, kiuj volus ion fari, sed ne scias kiel. Tiu nescio ofte forpuŝas homojn entute ion ajn fari, kaj la nefarado estas la unua kaŭzo de malsukceso kaj neaktivado.

SURPRIZO SEKVAS SURPRIZON

 UZE-estraro

Kiel bela Kristnaska donaco, atingis nian redakcion la jena mesaĝo:

Estimataj samideanoj,

Ekde la unua numero mi legas vian gazeton. Komence mi ne estis ĝia abonanto, sed ĝia kvalito instigis min pasintjare ekaboni ĝin. En la pasinta numero mi legis la artikolon pri anonima sponsoro el Svislando, kaj ankaŭ konatiĝis kun via invito subteni pluan aperadon per donacoj. Mi ne estas riĉulo, nek mi kutimas doni mian monon por similaj celoj, sed la ekzemplo de la svisa samideano kaj via aparta obstinado eldoni paperan gazeton, kiu ekde la unua numero konservis la preskvaliton kaj ĉiam rekonfirmas sian enhavan kvaliton, motivigis min fari favoron al vi. El mia pensia mono mi povas oferti al vi donacon

de 1000 eŭroj, kaj promesi ke mi estos daŭre via abonanto. La sumo mi pagos al la konto indikita en via gazeto, tre verŝajne antaŭ la fino de 2013.

Mi petas ke vi konservu mian anonimecon, ĉar tiu mia ago estas escepto, sed neniel kutimo dum mia multjara poresperanta agado.

La redakcio konfirmas, ke la promesita sumo de 1000 eŭroj alvenis precize la 31-an de decembro 2013. Kvankam estus necese publike danki al personoj kiuj ofertas sian monon por niaj projektoj, sen postuli ian ajn rekompencan, ni obeas la peton de la donacintoj, al kiuj ni esprimas nian elkoran dankon. La redakcio sentas sin honorigita kaj promesas daŭrigi la ĝisnunan redaktan kaj eldonan politikon ĝis kiam tio eblos.

Poezia anguleto

 *Emilija Obradović*

KIEL RAPIDE ...

*Kiel rapide riveroj forfluas?
Kiel rapide la suno subiras?
Kiel rapide obskuraj noktoj super ni malleviĝas?*

*Tamen, plej longe en koroj niaj,
dank' al stelo verda,
belegaj rememoroj por ĉiam al ni restas kaj kiel fajreroj arde briletas!*

TRI KONCEPTOJ DE MERKATIKO aplikeblaj al la Esperanto-Movado: segmentado, celgrupo-elektado kaj merkatico-mikso

 Dennis Keefe



Dennis Keefe (1951) estas usona esperantisto. Li eklernis Esperanton en 1980 en Madrido. Instruisto de Esperanto tie kaj multjare ĉe Grésillon (Francio), NASK (Usono), Herzberg (Germanio), kaj ankaŭ ĉe Oomoto en Japanio. Fondinto de Lingvaj Festivaloj, lanĉinto de la nova Universitato de Esperanto en 2012, kreinto de la BEK-Kurso, organizinto de la eksperimenta Esperanto-Insulo en Ĉinio. Dumviva membro de UEA. Esperantisto de la Jaro 2011. Profesio: 1) estrado de lingvo-instruado (Universitato de Illinois, Usono) kaj 2) strategio kaj merkatico (Ecole HEC, Francio; kaj MBA de la Universitato de Nankino, Ĉinio). Antaŭa estro de fabriko, merkaticisto por IBM, kaj direktoro de diversaj internaciaj programoj ĉe la Universitato de Illinois kaj Universitato de Nankino.

En klasika lernejo pri komerco, studentoj povas studi diversajn kursojn por multe lerni pri tio kiel sukcesigi ne nur firmaojn kaj profitdonajn entreprenojn, sed ankaŭ neprofitdonajn asociojn kiel tiujn de Esperanto. Kursoj pri kontiko, pri financo, pri estrado, pri logistiko estas kelkaj el tiaj kursoj. Sed eble la plej utila el tiuj fakoj por niaj Esperanto-movadoj estus merkatico. Merkatico kaj ĝiaj subfakoj (reklamado, informado, segmentado, novproduktoj, vendado, distribuado, promociado, publikaj rilatoj, esplorado kaj enketado, internacia merkatico, entrepreniko kaj aliaj), povas doni al ni kelkajn utilajn ideojn por sukcesigi Esperanton.

Multe da esperantistoj ne bone komprenas merkaticon, kaj multe da niaj samideanoj estas kontraŭ la utiligo de la scienco kaj arto de merkatico. Iasence, mi plejparte konsentas kun tia sinteno de niaj kolegoj, kaj mi mem estas radikale kaj funde kontraŭ la troa apliko de merkaticaj principoj en nia moderna mondo. Merkatico en la manoj de la plejparto de la grandegaj naciaj kaj internaciaj entreprenoj estas, laŭ mi, malbonaĵo de nia moderna mondo. Merkatico devas esti en la manoj de tiuj kiuj helpas plibonigi nian socion, sed tre bedaŭrinde, tiu fako estas ĉefe utiligata de la grandaj firmaoj kiuj, laŭ mi, ekspluatas nin. Mi kredas, ke Esperanto estas bona por nia socio, do mi esperas, ke la potencaj iloj de merkatico estos ankaŭ en niaj manoj.

En unu artikolo ne eblas, kompreneble, resumi la principojn de merkatico, aplikeblajn al

la Esperanto-Movado, do mi limigos min al **tri fundamentaj konceptoj**: segmentado, la elekto de unu celgrupo, kaj la apliko de la merkatico-mikso al la elektita celgrupo. Esperantistoj kiuj bone komprenas merkaticon, aŭ intuicie aŭ science, povas multe helpi al la Esperantanto-Movadoj antaŭeniri.

Eble la plej grava afero en merkatico estas elekti bonan celgrupon. Sed antaŭ ol elekti, unue vi devas iel dividi la loĝantaron (vian publikon, vian merkaton) al grupoj kaj subgrupoj. La proceso fari tion nomiĝas segmentado aŭ celgrupigo. **Segmentado** estas grava unua paŝo por sukcesigi ian ajn strategian kaj taktikan planon. Provi atingi samtempe ĉiajn grupojn, tio estas, la tutan publikon, estas fundamenta eraro en merkatico. Eĉ la plej lertaj kaj la plej monhavaj kompanioj ne faras tion. Ili ĉiam limigas sin al celgrupoj, ofte al tre malgrandaj celgrupoj. Segmentado, la divido kaj subdivido de la ĝenerala loĝantaro al multe pli malgrandaj celgrupoj, gravas.

Por dividi koncepte kaj praktike la publikon al celgrupoj, vi povas agi laŭ tre diversaj manieroj. Kelkaj ekzemploj helpas klarigi la koncepton. Vi povas dividi la merkaton laŭ la sekvaj kategorioj: laŭ sekso (viroj kaj virinoj), laŭ aĝo (geknaboj, junuloj, dekjaruloj, mezjunuloj, maljunuloj, ktp), laŭ eduko-nivelo (mezlernejo, altlernejo, universitato, magistrata nivelo, doktora nivelo), laŭ geografio (lando, landopartoj, urboj, kvartalo, ĉe marbordo, en montaro, en vilaĝoj, en urbetoj, en urbejoj), laŭ familia etapo (fraŭleca, geedzeca, unuinfana, duinfana,

postinfana, vidveca).

Ankoraŭ estas multe da aliaj kategorioj por segmentadi la loĝantaron. Pensu pri tio en kiaj interesgrupoj homoj jam troviĝas. Estas la ŝakludistoj, katoŝatantoj, kolektantoj de moneroj kaj poŝtmarkoj, vegetaranoj, lingvemuloj, matematikistoj, lingvo-instruistoj, dulingvuloj, fremduloj loĝantaj en ĉefurboj, turistoj al kutimaj turistaj landoj kaj turistoj al nekutimaj, parolantoj de aliaj artefaritaj lingvoj, instruistoj en elementa lernejo, Ĉinoj kiuj loĝas en Usono; Usonanoj kiuj loĝas en Ĉinio, ktp.

Koncerne segmentadon kaj celgrupojn ene de la Esperanto-Movado mem, ni povas pensi pri membroj de UEA, membroj de landaj kaj lokaj asocioj. Estas aktivaj kaj pasivaj membroj; novaj kaj malnovaj; EKSMEMBROJ (kutime tre grava celgrupo en asocio). Kaj eĉ en ĉiuj el tiuj kategorioj estas subkategorioj. Ekzemple, ni prenu la kategorion de eksmembroj. Estas eksmembroj kiuj estas tiaj ĉar ili forĝesis pagi kotizon; ĉar al ili mankas mono; ĉar ili neniam bone amikiĝis kun iu en la membrgrupo; ĉar ili iel ofendiĝis pri io, kaj tiel plu.

Post tiu unua paŝo de segmentado, vi devas nun elekti UNU el tiuj celgrupoj. Ĉu provi fari novan kurson en kvartalo x , en kvartalo y aŭ en kvartalo z ? Ĉu starigi kurson en granda urbo aŭ ĉu fari kurson en vilaĝo? Ĉu provi publikigi artikolon pri Esperanto en revuo por katoŝatantoj aŭ en gazeto por vegetaranoj? Ĉu unue celumi eksmembrojn de UEA por revenigi ilin, aŭ ĉu unue celumi novajn lernantojn de la reta kurso de Brazilo? Ĉu plibonigi la retejon de UEA por membroj, aŭ ĉu fari ŝanĝojn por altiri nemembrojn? **Elektado** estas ĉefa temo de merkatiko, kaj ĝi rekte aplikiĝas al nia mondo de Esperanto.

Segmentado bezonas

multe da pensado kaj analizado, ankaŭ la elekto de unu, kaj nur unu, el tiuj celgrupoj postulas multe da penslaboro. En ĉi tiu mallonga, supra artikolo ne eblas paroli pri ĉio kio bezonatas por fari bonan elekton de la celgrupo, sed ni povas pensi pri kelkaj kriterioj. Ekzemple, ĉu la segmento estas granda aŭ malgranda, kreskanta aŭ malkreskanta, facile aŭ nefacile atingebla, multekosta aŭ senkosta, strategia aŭ nestrategia, kongrua aŭ nekongrua kun niaj celoj? Kaj tiel plu. Ekzemple, en Francio, oni povas lupreni standon en komerca lingva foiro por la prezo de 1500 eŭroj, kaj oni povas havi standon en Lingva Festivalo senpage. La elekto dependos de la rilato inter la rezultoj, kaj la laboro bezonata por krei tiujn rezultojn.

Nun ni povas rigardi la trian fundamentan nocion de merkatiko kiu povas helpi al la Esperanto-movadoj. Post kiam vi dividis la merkaton laŭ diversaj manieroj (aĝo, profesio, ŝatokupo, geografio, etapo de familio, ktp), kaj post kiam vi elektis UNU segmenton, do unu celgrupon, vi nun devas fini vian laboron per ĝusta aldono de la tiel nomata **merkatika mikso**. La merkatika mikso estas via maniero bone servi vian elektitan celgrupon. El kio konsistas la merkatika mikso? Kutime oni mencias kvar fundamentajn elementojn: **produkto, prezo, distribuado kaj komunikado**.

Vi devas havi la bonan produkton aŭ servon, la bonan aŭ ĝustan prezon, la bonan lokon por doni aŭ vendi vian produkton, kaj la bonan sistemon de komunikado. Ke la lingvo Esperanto en si mem bonas, ne garantias la sukcesan servon de la celgrupo kiun vi elektis. Vi devas aldoni la ĝustan merkatikan mikson.

Kiel rilatas la koncepton **produkto** al Esperanto? Ni jam scias, ke nia lingvo estas tre bona elpensajo. Ĝi bone funkcias, kaj ĝi

konkurence gajnis rilate al ĉiuj aliaj planlingvoj. Sed prefere ne pensu pri la lingvo mem, pensu pri via kurso, via lernolibro, via retejo por instrui Esperanton. Tiaj aferoj ankaŭ estas servoj kaj produktoj laŭ la difinoj de merkatiko. Ĉu via kurso estas sufiĉe bona? Ĉu la instruisto estas afabla kaj interesiĝas pri la gelernantoj kiel homoj? Ĉu la retejo estas facile uzebla? Tro da nuntempaj Esperantaj retejoj ne estas tiaj. Ili estas konfuzigaj mozaikoj kaj krome, ofte, tre aŭ tro altrudemaj. Ĉu la celo de lernoretejo devas esti kolekti informon pri la gelernantoj, aŭ bone instrui Esperanton?

Prezo estas alia parto de la merkatika mikso. La prezo dependas de la elektita celgrupo. La prezo dependas ankaŭ de lokaj kulturo kaj kutimoj. La prezo dependas de la filozofio de la esperantistoj, kaj ankaŭ de la kostoj de la produkto aŭ servo. Ni prenu la ekzemplon *Kurso de Esperanto por Komencantoj*. Ĉu la gelernantoj devas aŭ ne devas pagi? Ĉu pagi nemulte aŭ multe; ĉu pagi same kiel por kursoj de la angla lingvo aŭ malsame? Dum mia Esperanta vivo mi aŭdis kursgvidantojn paroli tute por aŭ tute kontraŭ aliĝokotizo por siaj kursoj. Kion diras merkatiko pri prezoj? Fakte, ambaŭ prezostrategioj povas esti bonaj. Ĉio dependas de multe da faktoroj.

Alia grava parto de via merkatika mikso estas la tiel nomata **distribuado**. Tio estas, en kia loko okazos la ekpreno de la produkto aŭ servo? Ni prikonsideru la ekzemplon de *Kurso por Komencantoj*. La loko de la lernejo aŭ de la klasĉambro ege gravas kaj ege influos vian nivelon de sukceso altiri eklernantojn. Kiom da tempo bezonas via lernanto por atingi la lernejon? Ĉu la kursejo estas sufiĉe alloga? Allogeco ne egalas luksecon tamen. Multe da bonegaj kursoj de Esperanto okazas en tre modestaj klasĉambroj.

La nocio distribuado

aŭ loko ankaŭ povas aplikiĝi al la vendado de libroj de Esperanto. Multe da lokaj kluboj de Esperanto vendas siajn librojn nur inter la muroj de la loka klubo. Tia distribuado forprenas la eblon al la ĝenerala publiko ekvidi Esperanton en publikaj spacoj. Per la sistemo de privataj libroservoj, la movado iel kaŝiĝas. Tia nevidebleco de la agado de Esperanto ne estas bona por nia lingvo laŭ merkataka vidpunkto.

Laŭ mi, unu el la plej gravaj eraroj en la historio de la Esperanto-Movado estas starigi privatajn libroservojn anstataŭ kunlabori kun lokaj librovendejoj. La privataj libroservoj de Esperanto plene kontraŭstaras la bazajn principojn de distribuado kaj merkatikio. Tio estas alia temo por alia artikolo pri Merkatiko kaj Esperanto. Ni iru nun al la kvara ero de la merkataka mikso.

La unuaj tri partoj de la merkataka mikso estas produkto, prezo kaj distribuado. La kvara fundamenta ero de la mikso estas **kunmunicado**.

En merkatikio ekzistas multe da vojoj por sukcesigi la komunikadon. Kvar el la ĉefaj vojoj estas **reklamado, publikaj rilatoj, vendado kaj promociado**. Tiuj kvar faktoroj konsistigas la komunikado-mikson. Laŭ difino, reklamado estas pagataj anoncoj en amaskomunikiloj. Publikaj rilatoj, aliflanke, rilatas SENPAGAJN anoncojn kaj artikolojn en la amaskomunikiloj. Kio estas pli bona por Esperanto? Ĉu reklamoj, ĉu publikaj rilatoj? La respondo, laŭ mi, estas ke anoncoj kaj artikoloj kiuj ekaperas pro publikaj rilatoj estas multoble pli bonaj ol reklamado en la nuntempa disvolviĝo-etapo de Esperanto.

Krom reklamado kaj publikaj rilatoj estas vendado kaj promociado. Mi ne kredas, ke promociado tro aplikiga al nia afero, sed vendado jes ja. Unu el la ĉefaj nocioj de vendado estas

tiu de teritorio. Dividi la merkaton en teritoriojn unue, kaj poste, tre sisteme, kontakti ĉiujn eventualajn klientojn kiuj rilatas al via elektita celgrupo, unu post la alia, en tiu teritorio. Ekzemple, imagu ke vi volas starigi novan kurson en via lando. Ankaŭ imagu, (kaj tio dependas de la lando), ke kursoj por plenkreskuloj povas okazi ĉe kulturo-centro, ĉe biblioteko aŭ ĉe universitato. Profesia vendisto kontaktus ĈIUJN tiajn lernocentrojn aŭ letere/mesaĝe aŭ telefone aŭ persone aŭ per ĉiuj tri manieroj por unue ekscii kiuj povas ekinteresiĝi pri nova kurso de Esperanto.

Se en via lando estas 50 kulturo-centroj, 30 universitatoj kaj 80 bibliotekoj, tio estas 160 eblaj lokoj por Esperanto-kurso. Kutime, profesia, sistemeca kontaktado tute ne okazas en Esperantujo. Eble en iu loka klubo unu membro kontaktas la lokan bibliotekon kun la espero ekstarigi kurseton aŭ prelegon aŭ Esperantan ekspozicion, sed se tiu UNU biblioteko diras NE, la Esperanta klubo konkludas, ke neniu biblioteko, neniu kultura centro kaj neniu universitato ekinteresiĝos pri Esperanto. Laŭ mi, la manko de profesia labormaniero en la Esperanto-Movado ege malhelpas al ni. Starigi kontakto-

sistemon, plene esplori la teritorion, kaj apliki kelkajn metodojn de profesia vendado povas multoblige la sukceson de nia Esperanto-Laboro en multaj urboj kaj landoj.

Resumante, ni povas diri, ke la arto kaj scienco de la fako merkatikio povas aplikiĝi al nia laboro en la Esperanto-Movado. Scii kiel dividi la ĝeneralan publikon laŭ diverspecaj subgrupoj aŭ segmentoj estas valora ilo por lokaj, naciaj kaj internaciaj asocioj de Esperanto. Sekve, lerni kiel elekti nur UNU el tiuj celgrupoj, kaj poste servi ĝin bone per la kvar bazaj elementoj de la merkatikio-mikso estas tre bona aldonado al ĉiuj Esperanto-grupoj. Merkatiko certe ne estas la ununura vojo antaŭenigi nian lingvon. Estas multe da vojoj: politikaj, edukaj, popularmovadaj. Pri tiuj aliaj vojoj ni ankaŭ esperas aŭdi pli da utilaj ideoj. Ĉiaokaze ni ne forgesu, ke kerna parto, kaj eble la ĉefa parto de la sukceso de Esperanto estas en la manoj de niaj verkistoj, de niaj instruistoj, kaj de ĉiuj kiuj utiligas Esperanton por komuniki. En tia kadro merkatikio ankaŭ povas ludi sian malgrandan, sed gravan rolon montri Esperanton al nia mondo, kaj konvinki homojn eklerni kaj subteni ĝin.



MKR 25-JARIĜAS

 *Vanja Radovanović*

Kredeble aŭ ne, en la jaro 2014 la aranĝo konata kiel MKR (MontKabana Renkontiĝo) festos sian 25-jariĝon! Tia granda datreveno devas esti taŭge festita kaj sufiĉe frue anoncita, do jen la unua informo!

La 25-a MKR okazos en Sillian, Aŭstrio, inter la 18-a kaj 21-a de septembro 2014!

La jubilea MKR-aranĝo estos la plej okcidenta MKR el ĉiuj ĝis nun okazintaj. La orientirola aŭstria urbeto Sillian, en kiu MKR okazos, troviĝas tuj apud aŭstralia landlimo, ĉe la fonto de rivero Drava/Drau. Sillian estas konata vintra ripozejo kun pluraj skiejoj en sia ĉirkaŭaĵo, sed ĝi ankaŭ ofertas multajn ekskurseblecojn dum varmaj partoj de jaro. Ĝi troviĝas proksime al Karniaj Alpoj kaj tre proksime al Dolomitoj, unu el la plej konataj montaroj en la mondo.

La ejo kiu gastigos la partoprenantojn estas la pensiono



La pensiono "Schwarzer Adler" ("Nigra aglo")

"Schwarzer Adler" ("Nigra aglo"), kiu troviĝas meze de la urbeto. La pensiono povas gastigi 64 gastojn en 1-, 2-, 4- kaj plurlitaj ĉambroj, kaj ĝi estas facile atingebla trajne per regulaj trajnoj el Villach, Innsbrück kaj sudtiroloj italaj urboj.

La programo estas la jam kutima: dumtage ni ĝuos la belegajn montojn en la ĉirkaŭaĵo – Karniajn Alpojn kaj Dolomitojn (plej verŝajne ni vizitos la famajn Tre Cime di Lavaredo/Drei Zinnen). La ekskursoj estos planataj kaj por spertaj montmigremuloj kaj por ne

tiel ambiciaj promenemuloj.

Sed, la kvaronjarcenta jubileo postulas pli riĉan programon, kaj pro tio surprizoj jam estas planataj!

La aliĝilon vi trovos ĉe la adreso:

<http://keja.hr/mkr/aligxu-al-mkr/>

Sed, la konata adreso kaŝas la novan aspekton de KEJA/MKR-paĝaro – estas planate ke ĝi baldaŭ enhavos ankaŭ historian parton, kaj estos konektita per MKR-Facebook profilo.

IJK 2015 OKAZOS EN GERMANIO

 www.tejo.org

Kiel kandidato por organizi Internacian Junularan Kongreson en 2015, prezentiĝis nur la germana urbo Wiesbaden. La lastan tagon de 2013 pri tiu propono diskutis la Estraro de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kaj akceptis ĝin. Wiesbaden estis proponita de Germana Esperanto-Junularo (GEJ)



kaj Itala Esperantista Junularo (IEJ).

Kiel kongresejo servos junulargastejo de Wiesbaden, kiu disponigos pli ol 200 litojn kaj multajn pliajn lokojn la kongresanoj povos trovi en amasloĝejoj kaj kampoj por tendumado.

Pliaj informoj aperos poste en la retpaĝo de la IJK, kiu nun estas konstruata.

La germanan IJK-on anticipas la kongreso okazonta inter la 18-a kaj la 25-a de julio 2014 en Fortalezo, Brazilo.

ZAMENHOFA TAGO EN ZAGREBO

Redakcia kompilo



La multjaran tradicion de Esperantujo, tiun dediĉitan al la Esperantaj kulturo kaj literaturo, esperantistoj daŭrigis ankaŭ ĉi-decembre multloke tra la mondo, sub la origina nomo de Zamenhofa tago, sed ankaŭ sub aliaj nomoj, pli konvenaj por la moderna tempo. En Kroatio tiun tagon celebris esperantistoj en Zagrebo kaj Varaždin.

Preskaŭ cent personoj venis al la festado de Zamenhofa tago en Zagrebo, kiun la 13-an de decembro organizis *Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE)* en la granda salono de Kroatia Ekonomia Ĉambro - Zagreba Ĉambro en Draškovićeveva strato 45 (inter la 10h00 kaj 16h00). La bunta kaj abunda programo okazis en du partoj, inter kiuj estis unuhora paŭzo.

La unua programparto konsistis el du eroj: la oficiala prezento de la libro "Padma, la eta dancistino" de la fama mondvojaĝanto *Tibor Sekelj* kaj la Zamenhoftaga koncerto de *Neven Mrzlečki*.

La programon komencis la prezidanto de UZE, *Radenko Milošević*, per salutparolado, en kiu li parolis pri la ĝenerala situacio de la Esperanto-movado en Kroatio, kaj pri la rolo kaj atingoj de UZE en la pasinta jaro.

Tibor Sekelj, la iama zagreba studento, kies libron "*Padma, la eta dancistino*" eldonis ĉi-jare "Grafokom" el Đurđevac, okaze de lia 25-jara mortodatreveno, estis prezentita dum la Zamenhoftaga programo aparte riĉe. La libroprezenton gvidis profesoro Zdravko Seleš el Đurđevac, kiu en la komenco legis sian tekston "*Tibor Sekelj - homo al kiu ĉiuj envias*". Specialaj gastoj de la programo estis la vidvino de Tibor, s-ino *Erzsébet Székely*, kiu kune kun la nevino de Tibor, s-ino *Ljiljana Sekelj-Milenković* venis speciale el Hungario, respektive Serbio. S-ino *Erzsébet Székely* projekciis fotojn el la familia albumo kaj parolis pri "*Fragmentoj el la vivo de Tibor Sekelj tra fotoj*". La beograda jurnalistino *Zlatoje Martinov* prezentis mallongan recenzon pri la libro titolitan "*La beleco troviĝas en simpleco*" (bonvolu legi ĝin en "Zagreba Esperantisto" n-ro 25), kaj la studento *Đivo Pulitika* legis ĉapitron el la libro. La libroprezento finiĝis per "*Akcentoj el la recenzo de Yu Jianchao*", kiun sub la titolo "*Padma, filino de dancido*" prezentis profesoro Seleš.

La 45-minuta koncerto de *Neven Mrzlečki*, operkantisto de la Opero de Kroata Nacia Teatro, alportis aron da novaj melodioj, je ĝenerala ĝuo de la publiko. Li komencis la kantadon per "*Mia ŝipo*" de kroata poeto *Petar Preradović*, tradukita de *Mavro Špicer*, kaj aperinta en la unua numero de "Kroata Esperantisto" en 1908.

Post la koncerto la publiko ĝuis lunĉon kiun kunorganizis UZE kaj DEC, kaj en kies teknika preparo engaĝis sin *Marijanka Pleadin* kaj la personaro de la *Ekonomia Ĉambro*.

En la dua programparto estis anoncita Literatura konkurso "*Ivo Rotkvić*", kiun en la jaro 2014 organizos UZE, simbole renovigante la samnoman konkurson establitan de la iama Zagreba Esperanto-Ligo, kun la celo malkovri literaturajn talentulojn kaj stimuli ĉiaspecan literaturan kreadon (originalan kaj tradukan) en Esperanto.

Al la ĉeestantoj estis prezentitaj ankaŭ la gimnazianoj *Ana Lulić* kaj *Arijana Tkalčec* el Đurdevac, gajnintoj de la unua premio en la Deklamkonkurso okazinta en Bjelovar, kiuj majstre deklamis la poemon de *Julio Baghy* "Siberia lulkanto", kaj *Marija Vešnik* el Zagrebo, gajnintino de la dua premio same bone deklamis "Longe dum nokt' " de *Dragutin Tadijanović*.

Apartajn simpatiojn de la publiko elvokis la ĉarma infan-grupo "*Gajuletoj*" el Zagrebo kiu, kun akordiona akompano de sia instruistino *Silvija Fostač*, prezentis kelkajn gajajn kaj entuziasmigajn kantojn, aparte la kantojn pri sia loĝurbo Zagrebo, pri la regiono de Zagorje, kristnaskajn kaj ĝenerale konatajn porinfanajn kantojn.

Teatra gasto de la programo estis *Saša Pilipović* el Kragujevac (Serbio), kiu prezentis la projekcion/scenludon "*Rememoro*", rilatan al la 25-jara jubileo de sia aktora laboro, akcentante sian plurjaran intensan kunlaboron kun la forpasinta zagreba aktorino Vida Jerman.

Juna gastino *Veronika Poór* el Hungario, estrarano de TEJO, prezentis du temojn: "*Retradio Muzaiĉko*" kaj "*Kion faras TEJO nun?*", kaj *Josip Pleadin* (kiu cetere estis la programvidanto) en la "*Rapida prezento de kelkaj intaj kaj ontaj projektoj*" informis la publikon pri jam komenciĝintaj aŭ nur planataj projektoj okazontaj en 2014. El tiuj elstarigeblas la proklamo de "*La DEC-ida jaro*", la komuna tradukprojekto en kiu kunlabore de 28 tradukantoj DEC organizis tradukadon de alia libro de Tibor



Sekelj "*De Patagonio ĝis Alasko*", anonce de apero de la libro "*La Triĝiba monto*", abonkampanjo de "*Zagreba Esperantisto*" per kiu la redakcio volas atingi 300 regulajn abonantojn, ciferecigaj kaj bibliografaj projektoj de DEC, kaj aliaj projektoj.

Dum la programo funkciis malgranda libroservo, kiu ofertis librojn kun librotaga rabato, kaj invitis aboni la revuon "*Zagreba Esperantisto*", kies numero 25 estis prezentita al la ĉeestintoj. Por la Zamenhofa tago aperis du negrandaj, sed utilaj kaj valoraj libretoj: la jam longe atendata "*Jarlibro 2013*" de UZE, kaj la 56-paĝa kajero "*Dokumenta Esperanto-Centro 2010-2013*", kiu konigas al legantoj la nomojn de ĉiuj kontribuintoj de DEC en la kvarjara periodo. Pri ambaŭ eldonaĵoj legu pli detale en ĉi tiu

numero de "*Zagreba Esperantisto*".

Valoras mencii, ke per aparta buseto la Zamenhofan tagon en Zagrebo vizitis 13-persona grupo el Đurdevac kaj Bjelovar.

Dum la tuta tago en la teretaĝa galerio de Ekonomia ĉambro estis vizitebla ankaŭ la pentrajekspozicio de korea pentristo-esperantisto *Ho Song* titolita "*Azia paletro*".

La belega salono de *Ekonomia ĉambro*, la teknikaĵoj kaj la personaro (de vestogardistino, ĝis son- kaj komputil-teknikistoj kaj kuiristinoj), kiu zorgis por ke la tuta programo senĝene funkciis, estis senpage disponigitaj de la institucio kiu gastigis nin.

UZE plenkore dankas al ĉiuj esperantistoj kiuj organizis kaj partoprenis la programon, farinte ĝin tre bela evento ĉe la fino de 2013.

ZAMENHOFA TAGO EN TRIESTO

 Elda Doerfler



La tradicio en Esperantujo postulas celebradon de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof kaj, samtempe, de la Tago de Esperanto-Libro ĉirkaŭ la 15-a de decembro. Ankaŭ triestaj esperantistoj decidis soleni tiun daton kaj invitis geamikojn el la najbaraj landoj por kunfesti la 14-an de decembro 2013. En la sidejo de Triesta Esperanto-Asocio (via del Coroneo 15) ariĝis grupeto de dudeko da Triestanoj kaj venintoj el Ljubljana, Izola kaj Rijeka. La kunveno komenciĝis per malferma parolado de la TEA-prezidanto **Edvige Ackermann**, legis bondezirajn retmesaĝojn de esperantistoj el Armenio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Francio, Japanio, Kroatio, Pollando, Serbio, Usono kaj aliaj landoj.

Parto de artikolo pri-traktanta la grandecon de Esperanto kaj verkita de la neforgesebla **Ivo Lapenna**, eniris la aŭskultantaron en la esencon kaj sencon de tiutaga renkontiĝo. Post tio **Edvige Ackermann** daŭrigis, proponante profundan pripensadon de la nuntempaj malfacilaĵoj, kiuj tiom problemigas la vivon de preskaŭ ĉiuj Esperanto-asocioj kaj -societoj: malfacilaĵoj konsistantaj el ĉiam pli komplika vivtenado de grupoj, kies ununura enspezo foje devenas el magra rikolto de membrokotizoj, el

cerbumiga traserĉado kaj eltrovado de novaj metodoj por propagandi (kaj allogi!) en la nuna mondo ne tiom naiva, kaj precipe senigita je idealoj, taksataj kiel balasto de "praaj" tempoj.

En la "Tago de la Libro" preskaŭ devige estis aŭdigi ankaŭ la voĉon de nia Majstro, per prezento de liaj klaraj konceptoj rilate al literaturo en nia lingvo: "... ĉiu nova grava verko, kiun ni povas montri al la publiko, efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj ... Agadi per lernolibroj, anoncoj ktp estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon apud la literaturo kaj ne anstataŭ la literaturo" (el *Originala Verkaro*, paĝo 206).

Post tio okazis prezento de la libro "La Kapreolido Pirgo", aŭtorita de Anđelka Martić kaj tradukita de Josipa Katunar. Ĝin eldonis kaj presis en 2011 "Grafokom" el Đurđevac. La historio disvolviĝas ĉirkaŭ la renkontiĝo de la 5-jara knabo Željko kun la kapreolido Pirgo, el kio sekvas profunda kaj sincera interamikiĝo, sur partizan-milita fono: lia patro fakte estis partizano. Ĉio en la rakonto alcentriĝas al tiu interrilatado, densa je plej kortuŝaj emocioj, kiu laŭŝajne ne estis tiom kruele tuŝita de la konstanta minacado de danĝeroj tre realaj kaj konkretaj, kaj de la intimiĝo kun la krudeco de la tiea vivo. Estis legitaj





kelkaj partoj de la libro fare de **Elena Zerpini**, kaj fine **Vjekoslav Morankić** rakontis pri la libro kaj ties aŭtorino, pri la prezentado de la romano dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, en 2011 ŝiaĉeeste, pri la tradukistino **Josipa Katunar**, kaj pri la fakto ke "La kapreolido Pirgo" estis siatempe deviga lerneja legaĵo.

Sed la surprizoj dum la Zamenhofa Tago ne finiĝis tiele. Ankaŭ slovenoj deziris fariĝi protagonistoj de tiu bela kunveno kaj ... jen alia libro laste eldonita, havanta ankoraŭ tipan parfumon de ĵus finpresita papero. **Janez Jug**, prezidanto de la Slovenia Esperanto-

Ligo, ĝojigis la ĉeestantaron per la prezento de "El la ora boato", elektitaj poemoj de **Sreĉko Kosovel**, la avangarda slovena poeto kiu dum sia mallonga vivo (li mortis 22-jara en 1926 pro subita malsaniĝo) surpaperigis siajn sentojn kaj emociojn, parte rezultantajn el la soci-politika situacio en tiu mondoparto kie li vivis, inter sia vilaĝo Tomaj en Karsto, Triesto kaj Ljubljano. Antaŭparolo de **Baldur Ragnarsson** tre trafe enkondukis tiun valoran poeton, kun kiu – danke al Esperanto – povos konatiĝi homoj tra la tuta mondo: nu tiu elstara literaturaĵo transsaltos la limojn de lingvo de malgranda

popolo kaj atingos la vastecon de la kvin kontinentoj. Senriproĉe tradukis la poemaron **Vinko Ošlak** kaj ĝin precize kaj kompetente reviziis **Janez Jug**. Estis aparte agrabla surprizo tiu poemkolekto por Triestanoj, kiuj en tiuj poeziaĵoj legitaj en la slovena, itala kaj Esperanta lingvoj, trovis ankaŭ sian ĉirkaŭan medion, la Karston, tiel ke ili tuj povis mergiĝi en la vastan maron da tristaj, melankoliaj kaj amaraj pensoj, kiujn Sreĉko Kosovel tre patose kapablis eligi.

Nur por eta gustumado, jen unu el la legitaj poemoj:

Aŭtuno

*Eta pluvo rosfalas,
blankas la vojoj de Karst',
grizas mateno je fru'.*

*Pino, pino ne muĝas.
Kien la vojo rapidas?
Grizas mateno je fru'.*

*Litorno vekigās,
Ektremas, ekflugas,
Grizas mateno je fru'.*

Post la serioza, medi-tiga parto de tiu ĉeestinda kunveno, oni fine ekdistriĝis babilante en amika rondo, kaj abunde tostadis memore al nia kara Zamenhof.

ESPERANTO EN PRIVATA MEZLERNEJO

La 26-an de novembro en Mezlerneja centro "Ljubiša Mladenović" en Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), unuafoje okazis prelego pri Esperanto titolita "Esperanto, ponto inter homoj", kiun organizis Esperanto-societo "La Mondo". Al trideko da gelernantoj kaj profesoroj prelegis la societa vicprezidanto Miĉo Vrhovac, kiu parolis pri la historio de Esperanto kaj pri ĝia rolo en

Miĉo Vrhovac

fortigo de interhomaj ligoj. Post la fino de la prelego, la gelernantoj kaj profesoroj interparolis kun la preleganto, kaj kelkaj esprimis deziron lerni la Internacian Lingvon. Profesorino de la serbaj lingvo kaj literaturo Smiljana Antić, kiu kunorganizis la prelegon, kun la prezidantino de Esperanto-societo "La Mondo" Nada Mešinović kaj

la vicprezidanto Miĉo Vrhovac, interkonsentis pri sekvontjara kunlaboro, pri kiu oni planas subskribi protokolon, kiu difinos la kunlaborformojn.

En la repaĝaro de la Mezlerneja centro legeblis raporto pri la okazinta prelego kaj pri porkomencanta kurso organizota de la Esperanto-societo "La Mondo". La kurso komenciĝos en la unua parto de februaro 2014.



ĈU VI KONAS ASTRID LINDGREN?

Kerstin Rohdin

"Pri kio temas? Ĉu vi pensas, ke mi sidas tie ĉi kaj mensogas? Kion? Se vi pensas tion, nur diru!" diris Pipi tute minace kaj refaldas la manikojn.

"Ho, ne certe ne", timigite diris la knabino.

"Mi ne precize volas diri, ke vi mensogas, sed..."

"Ĉu ne," diris Pipi, "sed tio estas kion mi faras. Mi mensogas tiel, ke la lango nigriĝas. Ĉu vi vere pensas, ke infano povas vivi sen manĝo ekde majo ĝis oktobro? Certe mi scias, ke ili povas elteni sen manĝo ĉirkaŭ tri aŭ kvar monatojn tute bone, sed ekde majo ĝis oktobro, tio estas tro stulte. Vi certe komprenas, ke tio estas mensogo. Vi ne rajtas lasi homojn krediĝi al vi kion ajn."

(Citaĵo el "*Pipi Ŝtrumpolonga*")

Kial *Astrid Lindgren* estas tiel populara? Kial infanoj tutmonde legas ŝiajn librojn? Kial ŝiaj libroj, kiuj ĉiuj rolas en eta angulo de orienta Smolando, estas tradukitaj en 60 lingvojn? Kial la libroj konkeris la mondon, kiel filmoj, kiel teatraĵoj? Kial ŝi ricevis pli ol 40 diversajn premiojn?

Cio ĉi okazis ĉar ŝi neniam perdis la infanon en si mem, ĉar ŝi konservis en si vivantajn la sentojn, la ludojn, la timojn kaj ĝojojn de sepjara infano en la kamparo kaj en la urbeto, la urbeto *Vimmerby*. Ŝi skribas por plezurigi sin mem, kaj kiel ŝi mem diris, samtempe aliajn, kiuj memoras la ludojn, la timojn, la ĝojojn, la maljustecojn de la infanaĝo. Ŝi ne rigardis la infanojn kiel infanojn, sed kiel homojn, pri kiuj oni povas esperi.

Ŝi ne volas eduki per siaj libroj, sed plezurigi la infanon en si mem kaj samtempe aliajn. Ŝi bone konas la farmon en Smolando, la urbeton, sed ŝi ankaŭ konas "La Landon en la Malproksimo", konas "Nangjĵalan" kaj konas "La Fortikaĵon de Mattis". Kaj ŝi rakontas pri tio esperante doni al la infanoj iom da humanismo, iom da pozitiva rigardo al homaj rilatoj, al vivo, al demokratio, doni iom da normoj por la vivo. Hodiaŭ tio certe estas eĉ pli grava ol tiam, kiam estis skribitaj la libroj.

Kvar el ŝiaj libroj estas tradukitaj en Esperanton: "*La Fratoj Leonkoro*", tradukita de Kerstin Rohdin (Högsby, 1987), "*Pipi Ŝtrumpolonga*", tradukita de Sven Alexandersson (Motala, 1989), "*Emilo de Smolando*", tradukita de Kerstin Rohdin (Motala, 1993) kaj "*Mio, mia filo*", tradukita de Leif Nordenstorm (Göteborg, 2006).

Tiuj libroj estas kvaropo, kiu bone reprezentas la diversajn flankojn de la verkado de *Astrid Lindgren*. Tra ĉiuj ŝiaj verkoj lumas ŝia strebo por Bono kaj Paco en la mondo. Pro tio ŝi diris en speciale verkita antaŭparolo en la libro "La Fratoj Leonkoro": "*Esperanto estas bona lingvo por la fratoj, ĉar ĝi volas evoluigi pacon inter homoj*".

Astrid Lindgren metis en la buŝon de Pipi la vortojn, kiuj valoras ankaŭ por ŝi mem: "*Mi neniam volas fariĝi plenkreska*". La ludemo, la infanemo ĉiam restis en ŝi. Ekzistas foto pri ŝi, kiam ŝi, pli ol 70-jaraĝa, grimpis sur arbojn dirante: "*Kial maljunulinoj ne povas grimpi en arboj?*". La libro pri Pipi aperis en 1945, post

la Dua Mondmilito, kiam la "nova tempo" komenciĝis. Ĝi fariĝis "la novspeca infanlibro", en kiu la infano estu libera, ne subpremita, kiel ofte okazis pli frue. La legantoj de la libro tre ŝatis ĝin, kaj tre ŝatis Pipi, sed la "establaĵo" estis kritikata. Okazis longtempa debato pri tio, kiel devas konduti infano. La kritikantoj diris: *"Infano ne povas esti tiel memstara"*. La patrino de Pipi ja rigardis al ŝi de la ĉielo, kaj ŝia patro estis reĝo en Sudlandaj Insuloj. Iu el la establaĵo venis por diri al Pipi en la libro: *"Infano ne rajtas loĝi sola en iu domo, sed devas loĝi en 'infanhejmo"*. Pipi respondis: *"Mi ja estas infano, kaj tiu domo estas mia hejmo, do estas infanhejmo"*. Ŝi havas ĉiam trafajn respondojn al ĉiuj problemoj. Kiel multaj scias, Pipi estas "la plej forta knabino en la mondo". Ŝi diras: *"Kiam oni estas la plej forta, oni ankaŭ devas esti bonkora"*. Pripensindaj vortoj ankaŭ nuntepe!

La libroj pri Emilo el Smolando aperis en la jaroj 1963-1970. En ili temas pri knabeto ĉe la fino de la 19-a jarcento. Kiel knabeto Emilo, rolas la patro de **Astrid Lindgren**. Ankaŭ li, same kiel Pipi, multon faras tiel, ke la plenkreskuloj prijuĝas lin fikonduta. Sed rigardata "per aliaj okulvitroj", li vere multon helpis al malriĉuloj kaj al homoj, kiuj bezonis helpon. Ekzempla estas la fama julomanĝo, kiam Emilo aranĝis grandan feston per ĉiu julomanĝo de la farmo, donante ĝin al kompatinduloj en la malriĉulejo. Emilo faris tiom da "fikondutoj" laŭ la vilaĝanoj, ke ili kolektis monon inter si por forsendi lin al Ameriko, por ke la vilaĝo liberiĝu de li. Sed lia patrino koleriĝis kaj kriis al la vilaĝanoj, reĵetante la monerojn: *"Mi volas reteni mian Emilon. Li estas tre bona kaj mi amas lin"*. Emilo ĉiam povas elturniĝi el problemoj, kaj la patro de **Astrid Lindgren** estis vilaĝestro dum pluraj jaroj. La libroj pri Emilo rakontas pri malnova sveda kulturo en amuza kaj agrabla maniero, ke eĉ nuntempaj infanoj ŝatas lerni pri tio.

La libro, kiun mi plej ŝatas estas la libro "La Fratoj Leonkoro". Ĝi aperis en 1973, kaj estis ilustrita de la estona artistino Ilon Wikland. Regis ankoraŭ la Malvarma Milito. En la libro oni vidas la batalon inter

Bono kaj Malbono, inter Helo kaj Malhelo. Samtempe oni vidas inter la du fratoj fido-plenan amon kaj helpemon. En valo de rozofloroj minacas la Malbono. Oni devas ekstarti kaj kontraŭbatali ĝin. (Ĉu ne la temo, kiun oni rekonas hodiaŭ?) Alia temo, kiun oni tre pridiskutis en la tempo kiam aperis la libro, estas la morto. Ĉu tio estas temo de porinfanaj libroj? Post la aperigo de la libro la infanoj mem respondis. Multaj infanoj skribis leterojn al **Astrid Lindgren**, dankante ŝin por ŝiaj pensoj en la libro "La Fratoj Leonkoro". Ĉiuj infanoj ja havas homojn ĉirkaŭ si, kiuj mortas: ĉu geavojn, ĉu aliulojn. Ofte al la plenkreskuloj mankas vortoj por klarigi al la infanoj la morton. **Astrid Lindgren** klarigas ĝin en sia maniero – en la maniero, kiu bone taŭgas al la infanoj.


Jam en la jaro 1954 aperis "Mio, mia filo" en la sveda. Ĉirkaŭ duonjarcenton pli poste Esperantigis ĝin Leif Nordenstorm. En tiu libro ni sekvas la eventojn de sola, orfa knabo, kiu trovas bonan amikon. Tiu donas al la knabo pli riĉan, pli interesan vivon. Tiu knabo fariĝas bona, fidela amiko al la solulo. Krome, la solulo trovas sian patron, kiu estas reĝo en "La Lando Fore".

Astrid Lindgren ricevis multajn premiojn en diversaj landoj. Kiam ŝi ricevis la tre prestiĝan premion de "La Librovendejoj en Germanio", ŝi volis enmeti etan rakonton en sian dankparolon.

"Estis iam knabeto, kiu faris tiom da petolaĵoj, ke la patrino opiniis, ke ŝi devis bati lin. Ŝi ordonis al la knabo iri en arbaron por kolekti betulbranĉojn, tiel ke ŝi povos bati lin. La knabo eliris, restis longe, tre longe for. Kiam li revenis tre malgaja, li diris: 'Panjo, mi ne trovis betulbranĉojn. Anstataŭe mi prenis ŝtonon. Ĉu vi ne povas bati min per ĝi?'" La patrino ĉirkaŭbrakis la knabeton. Neniam plu ŝi batis lin."

Mi ricevis la grandan bonŝancon havi la eblecon rakonti, "prelegi" pri **Astrid Lindgren** en pluraj eŭropaj landoj, ankaŭ en Japanio. Mi partoprenis "Sumoo-n", kiun aranĝas s-ro Hori Jasuo. Mi rimarkis, ke en tiu "legorondo" kelkaj nepalanoj legis la libron "Mio, mia filo". Mi verkis artikoleton pri tio en la revuo de "Astrid Lindgren-societo".

La fadenoj kunplektiĝas!



Tri el la kvar Esperantlingvaj eldonoj de verkoj de Astrid Lindgren.

SENTEMAJ, ANIMTUŜAJ KAJ TRE LEGEBLAJ RAKONTOJ

Zlatoje Martinov

Marija Horžinek, LA TILIA URBO, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, Zagreb, 2013, Esperantigis Josip Pleadin

Marija Horžinek (1929-2000) estis kroata esperantistino kaj verkistino kies la nura libro estas ĝuste *"La tilia urbo"* en kiu ŝi priskribas diversajn temojn, precipe amajn. La rakontaron konsistigas 25 kurtaj rakontoj, fakte rakontetoj, kiujn *Marija Horžinek* verkadis dum la tuta vivo kaj publikigadis en diversaj, ne nur literaturaj, sed ankaŭ tagaj kaj semajnaj kroataj gazetoj kaj revuoj.

La tuteco kaj unueco de la rakontaro videblas jam en la titolo. Sen ajna dubo temas pri la aŭtorina naskiĝurbo Petrinja, pri kiu ŝi verkas kun multe da amsentio. Same, la amo estas la ĉeftemo de preskaŭ ĉiuj ŝiaj rakontoj. La rakontaro perteme tutklare konsistigas du periodojn: la unuan, pacan, kiu daŭris ĝis 1991, kaj la duan, militan, kiam Petrinja estis okupaciita (1991-1995) kaj la aŭtorino, kune kun la kroata loĝantaro, ekzilita.

En ambaŭ periodoj tamen, la amo estas la gvidlinio, kies emocia intenso kaj la impresa potenco kulminas en preskaŭ ĉiu rakonteto. Tial en la rakonto *"Kunvojaĝantoj"*, ekzemple, temas pri viro kaj virino en kupeo, kie ili ekparolas pri diversaj temoj, kaj dumparole ambaŭ rememoras pri sia(j) junaĝa(j) granda(j) amo(j). Ju pli ili interkonatiĝas, des pli al ambaŭ tiu alia persono forte similas al la iama, junaĝa amant(in)o. Ĉu estas LI?, pensis la virino, Ho dio, tio devas esti ŜI, li opiniis. Sed ili adiaŭas unu la alian, neniam eksciante la veron. Same sentema estas la rakonto titolita *"Someraĵ koloroj"*.



Plenaĝa vidvino interamikiĝis kun la samaĝa najbaro kiu same estas vidvo, malgraŭ la kontraŭstaro de sia filo kaj bofilino. La plenaĝa amo, pli precize dirite la amikeco inter la olduloj, tamen persistis ĝis kiam la vidvo decidis translokiĝi, por vivi kun siaj gefiloj. Sur la sama tema bazo estas verkita ankaŭ la rakonteto *"La spuro de Violeta"*. La rakonto *"La tilia urbo"* estas malgranda aŭtorina himno al ŝia urbo Petrinja; en la rakonton la verkistino tre lerte enmiksas la iaman amhistorion de du gejunuloj. Nome, post multaj jaroj la viro venas en la "tilian urbon" rememoriginte pri sia iama amatino, kaj tute neatendite trovas ke ŝi ne nur ankoraŭ vivas tie, sed fariĝis tre konata inĝenierino en la loka salamfabriko, ŝia vizaĝo eĉ fariĝis siaspeca varmarko!

Tre korduŝaj estas ankaŭ la rakontoj ekestintaj dum la periodo de la Patrolanda milito en Kroatio.

Tiaj estas ekzemple *"Antaŭ ŝtormo"*, rakonto pri du najbaroj, amikoj, sed malsamnacianoj, kiuj dum tiaj malfacilaj tempoj subite kaj definitive fremdiĝas, *"Adiaŭo al la defendanto"*, en kiu la edzino de la kroata defendanto konsolas la filineton, eksplikante ke ŝia patro pereis por la libereco, kaj konkludas: oni ne devas timi la morton, sed la vantan vivon. Same animtuŝa kaj emociplena estas la rakonto *"Panjo, kie vi estas"* pri permilite abrupte disiĝinta familio: la patro troviĝas ie en la serba koncentrejo, la patrino restis en la urbo danĝere minacata far la malamika armeo, kaj la gefiloj bonŝance estis senditaj al Zagrebo ĉe iu familio. La gefiletoj sopirantaj la patrinojn telefonas al ŝi okaze de Kristnasko kaj la plej juna filineto, ne komprenante la situacion etendiĝis sur la piedoj, prenigis la aŭskultilon, singultis pro larmoj kaj demandis: *Kie vi estas patrino, ni bezonas vin*. La infaneta krio tre dolore sonas en la oreloj de ĉiu sentema leganto. La rakonto *"Feliĉan Kristnaskon"*, estas sur la sama tema spuro, inspirita per la dummilita ekzila vivo de multaj homoj, same de la aŭtorino mem. La rakontoj *"Feniksa urbo"* kaj *"Hejmanoj"* estas teme ligitaj al eventoj tuj post la milito kiam la militaj rifuĝintoj revenis hejmen, al siaj detruitaj domoj, sed tamen feliĉaj, forte kredante ke oni konstruos novajn domojn kaj denove komencos la vivon. Ĉu oni devas aparte mencii ke la titolo *"La feniksa urbo"* rilatas al Petrinja, la aŭtorina urbo en kiu ŝi naskiĝis, plejparte vivis kaj mortis?

Konkulte ni diru ke la rakontoj de *Marija Horžinek*, kvankam oni ne povas taksii ilin literature altkvalitaj, estas pli ol simple amuzaj: sentemaj, animtuŝaj, tre legeblaj. Kaj tial ankaŭ legindaj.

PAVAO RITTER VITEZOVIĆ

Radenko Milošević

Estas iomete priplorinde, ke ni rememoras pri niaj granduloj nur okaze de rondaj datrevenoj de ilia naskiĝo aŭ forpaso. Ili meritas esti menciataj, kaj iliaj atingoj priskribataj ankaŭ sen datrevenoj, ĉar ilia kontribuo ofte servas kiel vivofonto kaj fundamento eĉ por nuntempaj generacioj.

Tri jarcentoj pasis post la forpaso de la unua kroata profesia verkisto, kiu verkis unu el la plej signifaj tekstoj pri la kroata historiografio de sia epoko, kaj la unuan historian verkon kiu servis al tiutempa aktuala politiko. **Pavao Ritter Vitezović**, la kroata historiisto, verkisto kaj leksikografo, tre aktive laboris ankaŭ politike, kaj verkis patriotisme pri tiutempaj eventoj. Li naskiĝis en la jaro 1652 en Senj, kiel filo de Antun Ritter, la enmigrinta oficiro, kaj Dorotea Lučkinić, la Kroatino el Senj. Lia naskiĝurbo estis la medio kun la glagolica tradicio, ĉar la episkopo de Senj ricevis en 1248 la privilegion de la papo, por rajti celebri la diservon en la popola lingvo. Kiel jezuito, Pavao lernis en la gimnazio de Zagrebo la retorikon, sed post ses jaroj da studado, pro siaj simpatioj por la rezistintaj banuso Petar Zrinski kaj duko Fran Krsto Frankopan, li devis forlasi la hejmlandon kaj foriri al Kroata (ilira) instituto en Romo, kaj aliloken.

Pro la famo, ke li estis la plej edukita homo en Kroatio, lia naskiĝurbo Senj en la jaro 1681, nomumis lin reprezentanto en la Hungara parlamento. Per tiu pozicio li sukcesis ricevi por sia urbo Senj la garantian pri la antikvaj urbaj rajtoj. Li partoprenis la militon kontraŭ Turkoj, dum kiuj li konatiĝis kun Adam, la filo de Nikola Zrinski, kiu per fipafoj el la dorsa flanko, estis mortigita ĉe Slankamen. Finfine li decidis reveni al Zagrebo, la urbo de sia junaĝo, kie Kroatia Parlamento (Sabor) promociis lin kiel administranton de presejo de la episkopa kancelario. Post la incendio de sia domo kaj forpaso de la edzino, li foriris el Zagrebo kaj elmigris el Kroatio, transloĝiĝinte al Vieno. Malgraŭ la akiro de barona titolo pro sia historia laboro, li restis senmona, home ofendita, kaj kun lezita nacia digno. Li mortis en Vieno en la jaro 1713, kaj restis memorita



kiel antaŭulo de la Ilira renaskiĝo.

Lia plej konata historiografia verko estas "Reviviĝinta Kroatio" (*Croatia rediviva*). Ĝi estas tre interesa kunligo de historiaj faktoj kaj historiaj fantazioj. La verko aperis en Zagrebo en 1700, latinskribe sur nur 32 paĝoj. Tekstoj estas parte en versoj kaj parte en prozo. Laŭ opinioj de iuj historiistoj, la verko estas "*enhave kaj tendence unu el la plej valoraj kroataj historiografiaj dokumentoj*".

Nekredeble ŝajnas, ke eĉ hodiaŭ, tri jarcentojn poste, la Kroatoj ŝanceliĝas en sia ortografio, ĉar ĝuste Vitezović antaŭ multaj jaroj, per sia verko pri la lingvaj kaj ortografiaj temoj, konstruis la fundamenton de la kroata lingvo. Apud aliaj verkistoj, li intencis ordigi la latinan skribmanieron por Kroatoj, sindone laborante por la politika unuiĝo de la kroataj regionoj, proponinta la samajn grafiajn solvojn por ambaŭ kroataj regionoj – la norda kaj la suda. Li tiam akcentadis en antaŭparoloj de siaj verkoj, kaj aparte en la eposo "*Plorantis Croatiae saecula duo*" (Du jarcentoj de ploranta Kroatio) el la jaro 1703, ke "*nun ĉiu laŭ propra volo, sed senorde skribas*".

Per sia traktato "Orthographia Illyricana" (La Ilira Ortografio) kiu, bedaŭrinde, estas perdita, li antaŭanoncis siajn aliajn verkojn pri la propra ortografia reformo. Nome, li konkludis ke "*la 23 literoj ne sufiĉas por la kroata lingvo*", sed, bedaŭrinta ke la Kroatoj ne akceptis, anstataŭ la neperfekta latina, kiel sian skribmanieron – glagolicon. Laŭ lia opinio, ĉiu fonemo devus uzi nur unu literon kaj laŭvoĉe oni ĉiam uzu la saman literon sen diakritaj signoj. Kompreninta la kernon de la glagolica skribo, li revenis al la origino, kiun "*sciis malnovaj Kroatoj kaj Sankta Jeronimo*", kaj li forĵetis du- kaj trilateralajn signojn. Tiun fundamenton nur pli poste sekvis Ljudevit Gaj kaj aliaj el la ilira rondo en la jaroj 1830. La leksikografia laboro de Vitezović estas nur parte konservita, kaj la plej valora estas la manskribita vortaro "*Lexicon latino-illyricum*", ĉar la kroat-latina parto perdiĝis. La vortaro estas skribita latine kaj kroate, unue en la naskiĝregiona ĉakava dialekto, sed pli poste li akceptis ankaŭ la kajkavan kaj la ŝtokavan, konsciita pri la tridialekta koncepto de la ĝenerala kroata literatura lingvo.

AKTIVECOJ DE CENTRO DE INTERKULTURA EDUKADO

 *Malgosia Komarnicka*

Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo ekestis la 2-an de septembro 2013. Ĝi estas parto de la registrita regiona kultura neprofito organizaĵo **Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz**, kies prezidanto estas **Halina Komar**. La regionan buroon en Vroclavo estras **Malgosia Komarnicka**.

Ekde la 17-a de oktobro la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo apartenas al la **Malsuprasilezia Federacio de Neregistaraj Organizaĵoj - ligo de asocioj**.

Poŝta adreso: Centrum Edukacji Międzykulturowej - Biuro Regionalne Wrocław
ul. Legnicka 65. PL-54-206 Wrocław. Pollando

Retadreso: informado.eo@gmail.com

Telefonnumero: +48 692 551 131 (al la direktoro - Małgosia Komarnicka)

ZAMENHOFA TAGO

La Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo (CIE-RBV) decidis konigi ankaŭ al neesperantistoj la Zamenhof-Tagon per kvartaga programo.

La 4-an de decembro, en la ĉambrego de la Klubo de Muziko kaj Literaturo en Vroclavo okazis renkontiĝo kun **Helena Biskup**, kiu prezentis la monodramon "Doktoro Esperanto" de Mario Migliucci, poligitan de **Roman Dobrzyński**. Ŝian aktoradon akompanis la muziko, plenumata de **Marek Minginowicz**, kaj **Malgosia Komarnicka** bonvenigis ĉiujn per bongustaj dolĉaĵoj, kaj salutis la publikon parolinte pri la historio kaj ideon de Esperanto.

Por la 5-a de decembro estis planita ekskurso "Trarigardo de Vroclavo laŭ la spuroj de koboldoj" kiu, bedaŭrinde, ne okazis pro la malbonega vetero.

La 6-an de decembro, en la Vroclava Centro de Pliĝuloj okazis Nikolao-festo, nomita "Esperantistoj al pliĝuloj". Organizis ĝin kune CIE-RBV kaj la Vroclava Centro de Pliĝuloj.

La programon komencis lernantoj de la Elementa Lernejo n-ro 9 en Vroclavo kiuj, vestitaj per bluaj pelerinoj kaj ruĝaj Nikolao-ĉapoj, kun gitarakompanado de sia instruistino **Marta Kollątaj**, prezentis belan muzikan programon, pro kio ili estis premiitaj aplaŭde kaj per donacoj, aĉetitaj per mono, kiun asignis la Kuraclokaro de Kłodzko.

Helena Biskup gvidis literaturan konkurson, en kiu la publiko devis la titolojn de poemoj de Julian Tuwim kaj Adam Mickiewicz. La venkintojn premiis la Nacia Banko de Pollando kaj la Vroclava Centro de Pliĝuloj.

Bela surprizo por la publiko estis renkontiĝo kun **Halina Komar**, la prezidantino de la Centro de Interkultura Edukado (CIE), kiu prezentis filmon faritan de Pola Televido kaj rakontis pri sia Esperanto-vivvojo.

Dum la tuta programo **Malgosia Komarnicka** kaj **Agnieszka Kokoszkiewicz**, kunordigantino de la Akademio de Pliĝuloj de la Vroclava Centro de Pliĝuloj, plenumis la rolon de sankta Nikolao, disdonante premiojn kaj donacojn.

La 7an de decembro, en la salono de Świebodzki-stacidomo, kune kun neesperantistoj estis festita la Zamenhof-Tago. La feston komencis la vroclava koruso **Eĥo**, kantante la eŭropan himnon Esperante, pole kaj germane (por la gastoj el Germanio). Poste parolis **Halina Komar**, la prezidantino de CIE, kaj la programon gvidis la direktorino de CIE-RBV, **Malgosia Komarnicka**, kiu prelegis pri la Esperanta historio.

En la vroclava festo ĉeestis **Zsófia Kóródy**, konata esperantistino kaj aktivulino el Germanio, kiu prezentis allogaĵojn de Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. **Halina Komar** entuziasme rakontis kiamaniere ŝanĝiĝis ŝia vivo dank' al Esperanto, kaj **Robert Kamiński**, la ĝenerala sekretario de PEA, prelegis pri Islando kaj la tie okazinta pasinta Universala Kongreso.

Belajn travivaĵojn alportis al la publiko la kantoj de la koruso **Eĥo**, la poemoj de **Halina Kuropatnicka-Salamon**, legitaj de la aŭtorino mem, kaj la amuza spektaklo de la kabaredo **Ĉe Stawa** el la Fervojsita Kulturdomo.



Ĉiuj partoprenintoj estis regalitaj per bongustaj kukoj kaj sandviĉoj, preparitaj de la estraraninoj de CEM-BRW *Ewa Tracz* kaj *Ula Paszkowska-Szczerba*.

La pena laboro de la membroj de CIE-RBV, kiu estis fondita nur septembre ĉi-jare kaj jam preparis por la neesperanta publiko ses sukcesplenajn aranĝojn*, pruvis, ke valoras profiti ĉiun okazon por

informi pri Esperanto. Valoras ankaŭ instigi al kunlaboro diversajn generaciojn - infanojn, junulojn kaj plenkreskulojn - el neesperantaj medioj. Krome valoras apogi unu la alian per ĉeesto en la organizataj entreprenoj.

En la jaro 2016 Vroclavo fariĝos Kultura Ĉefurbo de Eŭropo. Tio estas escepta ŝanco por Esperanto. Ni ne perdu ĝin. La Centro de Interkultura Edukado -

Regiona Buroo Vroclavo kune kun la Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sącz jam komencis la preparojn.

* Temas pri jenaj aranĝoj: Esperantaj ekspozicioj en Góra (la 6-an de oktobro), Vespero de hajkopoëzio en Vroclavo (la 22-an de oktobro), Esperantistoj al pliaĝuloj (la 8-an de novembro) ktp.

TAGO DE ESPERANTA LITERATURO FESTITA EN SUBOTICA

Kristina Kujundžić

La 15-an de decembro 1859 en Bjalistoko naskiĝis *Ludoviko Lazaro Zamenhof*, la kreinto de Esperanto. Esperanto estas unika lingvo kiu naskiĝis paralele kun sia skriba literaturo. Post la morto de L. L. Zamenhof Esperanto kiel lingvo kaj ideo kontinue disvolviĝas kaj allogas interesigon de intelektuloj, aparte de verkistoj kaj tradukistoj. Dum la UK en Danzig (nuntempe Gdansk en Pollando), en 1927, estis unuanime akceptita la propono de Julio Baghy ke la 15-a de decembro (la naskiĝtago de Zamenhof) estiĝu

la tago de Esperanto-literaturo. Ekde tiam oni festas ĝin vaste kaj oni konsideras morala devo de ĉiu vera Esperantisto aĉeti tiuokaze minimume unu Esperanto-libron. Kiam oni komencis uzi la esprimon "Zamenhofa tago" – oni ne scias. Tiel klarigis al ni, dum nia solena renkontiĝo la 15-an de decembro 2013 en Subotica, nia samideano *Đorđe Dragojlović*. Lia prelego pri la temo "Suboticanoj en Esperanto-literaturo" impresis nin, ĉar ĝis nun ne ĉiuj el ni estis konsciaj ke Subotica povas fieri pro tiom da esperantistoj kiuj okupiĝis(-as)

pri Esperanta literaturo: verkado, tradukado ... La plej konataj en nia medio estas: *Paŭlo Lengyel*, *Koviĵka Tiŝma Janković*, *Tibor Sekelj*, *Leopold Mokker*, *Blaŝko Gabrić*, *Bogoljub Grabarević*, *Terezija Kapista*, *Vladimir Kirda Bolhorves*, *László Huszár*, *Đorđe Dragojlović* ... Iuj el ili naskiĝis en Subotica, iuj vivis kaj agis en nia urbo, aŭ alimaniere estas ligitaj al Subotica.

Post la prelego sekvis dua parto de la programo: muzikaj programeroj. La juna kaj perspektiva lernantino de meza muziklernejo en Subotica, *Blanka László*, ludis ĉelon same bonege klasikajn numerojn, kiel ankaŭ popularajn Esperantajn melodiojn akompanante nian komunan ĝojan kantadon. Sinjoro *Dietrich* per sia majstra harmonika ludo kaj kantado riĉigis tiun nian solenan renkontiĝon. Kompreneble, ne mankis ekspozicio de Esperanto-revuoj haveblaj en nia medio kaj la libroservo, kvankam modesta, tamen ebligis al iuj aĉeti almenaŭ unu libron kiel decas al ĉiu vera esperantisto en tiu tago. La programon sindoneme aranĝis nia diligenta sekretariino Aranka László.



MIAJ MEMOROJ PRI PRISKA HAAS

 *Milan Topolnik*

Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Priska Haas**, la edzino de d-ro **Henrik Haas**, la advokato, kiu fondis Esperanto-Societon en Maribor (Slovenio) en la jaro 1910. Sinjorino **Priska Haas** estis longtempa membrino de tiu ĉi Societo kaj tre ŝatata instruistino de Esperanto. Ŝi senpage instruis Esperanton al multaj gelemantoj en sia loĝejo. **Priska Haas** estis tre afabla, helpema kaj klera sinjorino, kiu kapablis transdoni sian bonegan lingvoscion al siaj gestudentoj. Multaj el ili nun estas kuracistoj, ĵurnalistoj, advokatoj, profesoroj, filozofoj, fervojistoj... Mi memoras, ke unufoje semajne mi vizitis sinjorinon **Haas**, kiu preparis min por fari B-ekzamenon. Danke al ŝi kaj al miaj preparoklopoj, mi sukcese pasis la menciitan ekzamenon...

Dum mia studado de lingvistiko en Ljubljana, mi ankoraŭ vizitadis s-inon **Haas** unufoje semajne por havi agrablajn kaj interesajn konversaciojn en Esperanto. Dum unu el miaj vizitoj ŝi menciis, ke eĉ Josip Broz Tito scipovis Esperanton, kiun li ellernis en la maribora malliberejo ... En la loĝejo de s-ino **Haas** mi iam renkontis ŝian filinon **Herta**...

Priska Haas mortis en Maribor en la jaro 1975, kiam mi servis en la armeo en Jastrebarsko...

Pro sia bonfaremo, bonkoreco, idealismo kaj entuziasmo pri la Esperanto-movado, Priska Haas restos daŭre en miaj pensoj kaj koro.

Al la 125-a datreveno de naskiĝo de **Priska Haas** estis dediĉita ankaŭ la ĉi-jara Zamenhofa

tago, organizita de Esperanto-societo Maribor la 7-an de decembro en *Mestna četrt Center*. La programon partoprenis kvardeko da esperantistoj el pluraj slovenaj urboj (Izola, Krško, Ljubljana, Sevnica). Ĉeestis ankaŭ la nepo de Priska Haas **Srmen Krstev** kaj la pranepo **Marko Vitez** el Beograd. Grupo de esperantistoj vizitis ankaŭ la tombon de **Priska Haas** en la Maribora tombejo.



<http://esperanto-maribor.si/>

LA ĈEFDELEGITO DE UEA INFORMAS

Boris Di Costanzo, la ĉefdelegito de UEA por Kroatio, dissendis informilon pri la membrototizoj de UEA por la jaro 2014: MG - 45,00 kunaĵoj; MJ(T) - 105,00 kunaĵoj; MA(T) - 265,00 kunaĵoj; DM(T) - 6.625,00 kunaĵoj; DM(J) - 2.625,00 kunaĵoj; SA - 160,00 kunaĵoj; Kto - 95,00 kunaĵoj; SZ - 530,0 kunaĵoj. Pri la pagmaniero bonvolu informiĝi ĉe la ĉefdelegito:

Boris Di Costanzo, Ŝet. Carmen Sylve 19, HR-51410 Opatija
telefono: 051/715309; poŝtelefono: 098/9294623
bdesperanto4@gmail.com



MARIJA BISTRICA

 Redakcia kompilo

la plej granda katolika pilgrimejo en Kroatio

Marija Bistrica estas la plej granda romkatolika pilgrimejo en Kroatio, dediĉita al Dipatrino Maria.

La vilaĝo *Bistrica* unuafoje estis menciita en la jaro 1209 en la ĉarto de la reĝo *Andreo la Dua*. La paroko en *Bistrica* unuafoje menciigas en 1334.

La nomo *Marija Bistrica* rilatas al la malkovro de miraklofara statuo de Dipatrino. La statuo de nigra Dipatrino, kiu origine troviĝis en la kapelo de *Vinski Vrh*, proksime al *Marija Bistrica*, pro la danĝero ke la turkoj profanos ĝin, estis kaŝita en la paroka preĝejo de *Bistrica* malantaŭ novmasonita muro. Ĝi estis retrovita en 1684. La kroata parlamento en 1715 konstruigis la votan altaron, kaj en 1731 la episkopo *Juraj Branjug* konsekris la novan preĝejon je honoro al Neĝa Dipatrino. Ekde tiam la antaŭa *Bistrica* ĉiam pli ofte nomiĝis *Marija Bistrica*. La Episkopa konferenco en 1971 proklamis la vilaĝon *Marija Bistrica* nacia sanktejo kaj dekretis la 13-an de julio kiel festotagon de Dipatrino de Bistrica. Ĉiujare al *Marija Bistrica* pilgrimas ĉirkaŭ 800.000 katolikoj.

Krom la bazilikforma preĝejo, en ku troviĝas la miraklofara statuo de Dipatrino de Bistrica, la pilgrimantoj kutime vizitas ankaŭ la proksiman monteton *Kalvario*, kun la stacioj de krucvojo, el kiuj ĉiu estas aparta artverko de konataj kroataj skulptistoj.

La plej solena tago en la historio de *Marija Bistrica* estis la 3-a de oktobro 1998, kiam la papo Johano Paŭlo la Dua vizitis la pilgrimejon kaj proklamis la iaman zagreban ĉefepiskopon *Alojzije Stepinac* beatulo. Pri tiu evento la pilgrimantojn memorigas la statuo de Johano Paŭlo la Dua.

Verŝajne pro la evoluo de religia turismo, en *Marija Bistrica* konserviĝis malnovaj metioj, ekzemple mielakvito, potisto, produktisto de tipaj lignaj ludiloj, mielkukisto ktp.

Marija Bistrica troviĝas en Hrvatsko Zagorje (Kroatio Postmontaro) la nordokcidenta regiono de Kroatio. Tiu regiono, krom la pilgrimejo en *Marija Bistrica*, ofertas al vizitantoj ankaŭ multajn historiajn lokojn, kaj certe estas neevitinda, se vi vizitas Kroation.



La statuo de Johano Paŭlo la Dua en *Marija Bistrica*

JA ĈIU TAG' FORLAVAS RABE IUN ...

Josip Pleadin

Parafrazante la latvan Esperanto-poeton, kiu en sia "Aŭtuna elegio" skribis ke "Ja ĉiu tag' forlavas rabe ion", ni konsciigas, ke ĉiutage nian rondon forlasas la plej bonaj el ni. Pasintnumere ni skribis pri neatendita forpaso de Esperanta verkistino Lena Karpunina. Ŝi partoprenis la renkontiĝon de Esperantlingvaj verkistoj en Kroatio en la jaro 2009. Ankoraŭ ne sekigis la farbo per kiu estis presita ŝia nekrologo, kiam atingis nin malĝojiga informo pri la forpaso de ankoraŭ unu partopreninto de la sama renkontiĝo. La 25-an de decembro la morto rabis el niaj vicoj la redaktoron de "Literatura foiro" - Ljubomir Trifončovski. Li estis nur 55-jara.

Komence de 2013 Ljubomir suferis pro rompo de preskaŭ ĉiuj ripoj, sed lastatempe ŝajnis ke la vivo revenas al normala stato kaj ke Ljubomir komplete resaniĝos. Bedaŭrinde, en lia organismo inside minacis trombo, kiu fine kaŭzis pulman embolion, el kiu Ljubomir ne sukcesis saviĝi.

Ekzistas ĉiaspecaj esperantistoj, sed la forpasintan Ljubomir mi rememoras kun tre grandaj simpatioj. Nia kunlaboro ne estis longdaŭra, sed mi povas aserti, ke li estis sindonema kaj kapabla laboranto por Esperanto. Eble kelkaj ne pardonas lian sukceson, kaj eĉ en la momento kiam atingis nin la malĝojiga novaĵo pri lia morto, iuj arogis skribi pri li preskaŭ kiel pri malamiko de Esperanto. Laŭdire, li estis la ĉefa bastiono de la t.n. "silferismo", respektive de la Esperanta Civito, kies vickonsulo li estis.

Ljubomir lernis Esperanton kiel adoleskulo, kaj la reston

de sia vivo li estis entuziasma kaj plene fidela al tiam akiritaj ideoj. Laŭprofesie li estis pupteatra dramaturgo, sed li okupiĝis pri beletra kaj publicistiko.

Li fieris esti bulgario, sed lia laboro ne haltis ĉe la limoj de Bulgario, fariĝinte vere internacia aganto.

Mia kunlaboro kun Ljubomir datas ekde la ĵurnalista kongreso okazinta en Vilnius (Litovio), kie ni ambaŭ partoprenis. Sed lian intensan pensadon pri Esperantio kaj lian energian laboradon mi ekkonis nur poste. Je mia invito li venis Kroation por partopreni la 10-an kongreson de kroataj esperantistoj en Koprivnica en 2012, kiun li salutis nome de bulgarioj el la kongresa parolejo (vidu la ĉi-supran foton). Aparte agrabla kaj ideoriĉa estis kunestado kun li kaj aliaj diverslandaj esperantistoj en la postkongresa pikniko.

El lia Esperanta biografio valoras mencii, ke dum sia juneco li aktivis en TEJO, kunlaborante kun la organiza stabo de TEJO-kongreso en Vraco en 1993.



Tri jarojn poste li okupis la postenon de la redaktoro de "Literatura Foiro", konscie gvidante ĝian redakcion dum 18 jaroj. En tiu periodo li redaktis 108 numerojn!

Li estis ankaŭ reprezentanto de la Esperanta PEN-Centro dum PEN-kongresoj diverslande. Inter 2005 kaj 2013 li estis sekretario de la Esperanta PEN-Centro dum tri mandatoj.

Dum lastaj monatoj li laboris ankaŭ super la teatra terminaro.

Li estas entombigita la 27-an de decembro en la malnova tombejo de Vraco.

Gloron al vi, kara Ljubĉo, mia amiko kaj kunlaboranto!





FORPASIS LA BONA SPIRITO DE AIS

✍ Dragutin Smolić

figuroj de tiu institucio kaj ĝia "bona spirito".

Li studis matematikon, fizikon kaj filozofion en Stutgarto, Tübingen kaj Parizo (1951-1958). En 1956 li magistriĝis pri matematiko, en 1957 faris la samnivela instruistan ekzamenon pri matematiko kaj fiziko kaj en 1958 doktoriĝis pri filozofio. Inter 1958 kaj 1961 li estis gimnazia instruisto pri matematiko kaj fiziko. De 1961 ĝis 1963 li laboris en kibernetika esplorgrupo gvidata de Karl Steinbuch en Karlsruhe. Tiam profesoro Frank iniciatis la unuan germanan konferencon pri programita instruado kaj instru-aŭtomatoj. En la sama jaro la pedagogia universitato de okcidenta Berlino vokis lin kiel profesoron al kibernetika katedro. En 1984 li fondis tie la Instituton pri Kibernetiko kaj akceptis en 1972 inviton al la (tiutempe fondota) universitato de Paderborn. Fine de la 1970-aj jaroj kaj komence de la 1980-aj li iniciatis kaj gvidis internacian eksperimenton pri propedeŭtika valoro de Esperanto.

En 1985 profesoro Frank estis kunfondinto de AIS San-Marino kune kun Reinhard Selten, Ivo Lapenna, Fabrizio Pennacchietti, Humphrey Tonkin kaj aliaj, kaj ĝia prezidanto ĝis decembro 2007.

Dum kelkaj jaroj profesoro Frank estis estrarano de la kibernetika asocio "Association Internationale de Cybernétique" (AIC) kaj konvinkis ties prezidanton Georges Boulanger, ke Esperanto estu tria lingvo (post la franca kaj angla) ĉe la AIC-kongresoj.

Kun profesoro **Helmar Frank** mi kunlaboris dum preskaŭ 40 jaroj. Niaj vojoj interkruciĝis dum Vintra Esperantista Feriado (VEF) en Budapeŝto en la jaro 1974. Por mallonga tempo mi posteniĝis en la Instituto pri Kibernetiko, kie li direktoris. Poste, dum jaroj mi laboris en la Esperanto-Centro Paderborn. Profesoro Frank kaj mi kune vojaĝis al multaj Esperantaj aranĝoj en Germanio kaj eksterlando. En neesperantistaj societoj li ĉiam nomis min "kolego". Post lia serioza malsaniĝo, li vivis en hejmo por maljunuloj, kie d-ro Kassellmann kaj mi de tempo al tempo vizitadis lin. En lia ĉambro en la hejmo por maljunuloj troviĝis multegaj diversaj diplomoj, kiujn li ricevis kiel konata fakulo pri kibernetiko. La lastan fojon mi renkontis profesoron Frank en februaro, dum la festado de lia naskiĝtago.

Sed, pri profesoro Frank necesus skribi multe pli, ol diras miaj rememoroj. Li naskiĝis la 19-an de februaro 1933 en Waiblingen. Li estis fama matematikisto, pedagogo kaj profesoro pri kibernetiko, inter esperantistoj estas ĉefe konata kiel prezidanto kaj kunfondinto de AIS (Akademio Internacia de San-Marino), supozeble unu el la ĉefaj

Profesoro Frank lekciiis en universitatoj de Berlino, Prago, Sibiu, Kanton, Nitra kaj Rosario.

En 1998, pro siaj meritoj, profesoro Frank ricevis la unuaklasan Federacian Meritkrucon de Federacia Respubliko Germanio. En la jaro 2004 li estis elektita "Esperantisto de la Jaro".

En la jaro de lia forpaso, 2013, okaze de lia 80-a naskiĝdatreveno, aperis la libro *Littera Scripta Manet, sarta in honorem Helmar Frank* editorita de lia edzino Věra Barandovská-Frank, konata esperantologo kaj interlingvistikisto, kaj kun plurlingvaj eseoj de sesdeo da liaj amikoj.

Post plurjara malsano, kiu malebligis al li labori, li forpasis je Zamenhofa tago, la 15-an de decembro 2013. Korpe li foriris al eterneco, sed spirite li vivos inter ni pro siaj valoraj faroj.



JUNULARA ARANĜO MIRO 2014 EN KRIŽEVCI

 Retejo de KEJA

Ĉu vi jam aŭdis la proverbon ke "Ĉiuj vojoj gvidas al Romo"? Jes? Ĉu vi pensas ke ĝi pravas? Ve, vi trompiĝis! MIRO 2014 okazos en urbo Križevci je nur unu horo da veturado for de Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio. Krom ke ĝi estas konata kiel perfekta kuniĝo de urbeco kaj kampareco, moderneco kaj tradicieco, ĝi estas konata ankaŭ pro la netuŝita naturo kiu ĉirkaŭas ĝin. La urbo troviĝas sub la magia monteto Kalnik (643 metroj).

La riĉa programo de MIRO ne okazos nur surstrate, sed ankaŭ en la urba dormejo, en la urbocentro kaj ĉe la urba naĝejo. La programo de MIRO 2014 enhavas multspecan tagan (ekskursoj, naĝado, konatiĝo kun la urbo, prelegoj ktp) kaj noktan programon (koncertoj, festoj, rigardado de steloj, kursoj de fremdaj lingvoj ktp). Komprenible, se vi volas pliriĉigi la programon je iu ajn maniero, bonvolu skribi tion en via aliĝo. Prelegoj kaj ĉiuj kursoj tre bonvenas!

La venonta MIRO okazos inter la 2-a kaj la 8-a de aŭgusto 2014.

Kaj jen iomete pri la kostoj kaj kotizoj:

Deviga antaŭpago po persono kostas 15 eŭrojn. Ĝi ne estas redonebla, sed estas transdonebla al alia persono. Aliĝo ekvalidos ekde la dato de ricevita antaŭpago.

Plena kotizo varias inter 170 kaj 215 eŭroj (depende de aĝo, landkategorio aŭ aliĝperiodo).

Krompago por invitletero: 10 eŭroj

La kotizo inkluzivas: dormadon en 2-, 4- kaj plurlitaj ĉambroj en la urba dormejo, 3 manĝojn tage, ekskursojn kaj

trarigardon de la urbo Križevci kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, kaj riĉan programon.

Pagojn oni faru al la bankokonto de la loka organizanto: Esperanta Societo "Estonteco" Križevci:

HR4023400091110542130

(Banko: *Privredna banka Zagreb*) aŭ al oficialaj perantoj dum renkontiĝoj.

Por kontakti kun la organizanto, bonvolu uzi la jenajn kontakteblecojn:

Esperanta Societo "Estonteco"

Mali Potočec 32

HR-48260 Križevci

Kroatio

Retadreso:

esperanto.estonteco@gmail.com

Pliaj informoj pri la aranĝo (reta aliĝilo, programo, listo de aliĝintoj) troviĝas en la retejo de Kroata Esperanto-Junulara Asocio (KEJA):

<http://keja.hr/miro/miro-2014/?lang=eo>

La 19-a istria libro-foiro, okazinta en Pula inter la 5-a kaj 15-a de decembro anoncis, ke ekde ĉi tiu jaro ĝi atribuos **Premion por legantoj**, kiu portos la nomon de ĉi-jare forpasinta kroata esperantisto **Ivo Borovečki**.

Laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA, dum la 39-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kiu okazis la 30-an de novembro kun sesdedo da vizitantoj el naŭ landoj, en la Libroservo plej multe furoris *Esperanto as a starter*

language for child second-language learners in the primary school (resuma raporto pri la projekto Springboard to Languages), la freŝa n-ro 18 de *Beletra Almanako*, la rakonto **Padma, la eta dancistino** de Tibor Sekelj kaj la fabelromano *Erik aŭ La malgranda insektolibro* de la nederlanda verkisto Godfried Bomans.

Ilustristo **Tihomir Lovrić**, kroata esperantisto kaj membro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, ilustris kamiŝbajan fabelon de

Giorgio Silfer. Publika prezento de la verko estas planata por komenco de 2014.

Junuloj **Josip File** kaj **Stipan Milodanović** antaŭ kelkaj jaroj vojaĝis tra Sud-Ameriko sekvante la spurojn de **Tibor Sekelj**. Pri sia vojaĝo ili faris filmon, kiu estis prezentita la 28-an de novembro en Zagrebo, en la Teatro &TD. Ekzistas versioj de tiu filmo en la angla kaj Esperanto, tradukitaj de **Ljiljana Sekelj-Milenković**, la nevino de **Tibor Sekelj**.





Plezure mi ricevis la numerojn 2, 3 kaj 4 de “Zagreba Esperantisto”. Ĝi estas enhavoriĉa, kun belaj koloraj fotoj. Tre entuziasme mi legis ĉiujn numerojn. Mi kuraĝiĝis pro la artikolo pri Dokumenta Esperanto-Centro, temanta pri kolektado kaj konservado de Esperantaj dokumentoj. Ankaŭ ni havas Esperantan bibliotekon en la oficejo de Srilanka Esperanto-Asocio. Ni havas pli ol 1500 librojn, kvankam nia movado en Srilanko estas tre malgranda. Ĝi havas entute ĉirkaŭ 30 membrojn. Ni havas grandan problemon pro la izoliteco. Azia Esperanto-movado kreskas en oriento, sed nian landon alfrontas gravaj problemoj. Srilankanoj ne bezonas alian lingvon krom la angla, ĉar ĝia superregado ankoraŭ ekzistas. Konvinkado pri lingva egaleco estas tre malfacila. La dua problemo estas, ke nia asocio estas malgranda kaj pro tio mankas mono por pli vasta agado. Srilanko estas malriĉa lando. Ni volis organizi nian unuan nacian kongreson, sed pro monmanko ni rezignis. Malgraŭ tio mi pensas pozitive. Mi kompilis

Esperanto-sinhalan vortaron, kiu estas la unua Esperanta vortaro en la sinhala lingvo. Mi esperas plue ricevadi vian revuon, ĉar niaj esperantistoj ankaŭ volonte legos ĝin.

**Zeiter Perera, prezidanto
de Srilanka Esperanto-Asocio**

Tre rare en la kroataj Esperantaj gazetoj niaj samideanoj skribas pri naturprotektado. Tiu temo jam longan tempon multe interesas min, kaj jen kion mi pensas pri ĝi.

Nia movado estas pacama kaj ni ankaŭ alproprigis la verdan koloron. La paco estas tre grava por la homaro, sed la plej grava problemo nuntempe estas kiel konservi kaj protekti la naturon por la futuraj generacioj kaj kiel ankaŭ haltigi la klimatoŝanĝojn? La nuntempaj homoj havas tute aliajn problemojn, ekzemple kiel trovi adekvatan laboron, havi bonan salajron, aĉeti aŭtomobilon, havi novajn belajn meblojn, aĉetadi ĉiam novajn aĵojn.

Kien kondukas tia nekontrolita konsumado, ĉar post

tio sekvas ĵetado de multegaj produktoj, kaj malpurigado de la naturo? Nur Britujo en unu jaro produktas ĉirkaŭ 100 milionojn da tunoj da rubaĵoj. Tiu stulta bildo kaj irado de la mondo kondukas al la pere de nia civilizo.

La antikvaj sumeranoj antaŭ 6 mil jaroj vivis en la harmonio kun la naturo. Ĉu ni devas iomete halti, pripensi tre serioze la situacion?

Antaŭ nelonge mi aŭdis la diraĵon: *Dio pardonas ĉiam, homo iufoje, sed la naturo neniam.* La esperantistoj propagandas nian lingvon, kelkfoje pli simplan ol aliaj naciaj lingvoj, kaj la pacon kiel la plej gravan valorojn de nia movado, sed en ĉi tiu turbulema kaj malfacila tempo nia samideanoj devus doni ankaŭ kontribuon en protektado de la naturo.

Marijan Benc (Sesvete)

Mi devas diri, ke kun ĝuo mi legas ĉiam vian gazeton. Ĝi estas bonega, kaj vi meritas ĉian laŭdon pro ĝia riĉa, varia enhavo.

**Erzsébet Székely
(Szeged, Hungario)**

ESPERANTO-KASTELO GREZILJONO EN 2014

19-a ĝis 26-a de aprilo: **FRINGOJ**, renkonto inter grupoj de Esperanto-lernantoj kaj iliaj instruistoj.

26-a de aprilo ĝis 4-a de majo: **PRINTEMPaS**, intensivaj kursoj en 3 niveloj, internaciaj KER-ekzamenoj

B1-C1. **Rete: gresillon.org/printempo**

8-a ĝis 11-a de majo: Kantado de korusaro Interkant'

11-a ĝis 17-a de majo: Renkonto de rememoroj inter malnovaj esp-istoj kaj iamaj gastoj de Greziljono.

Rete: gresillon.org/s1

26-a de junio ĝis 6-a de julio: Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. **Rete: gresillon.org/s2**

1-a ĝis 9-a de aŭgusto: Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso.

Rete: gresillon.org/s3

1-a ĝis 9-a de aŭgusto: Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto.

Rete: gresillon.org/s4

24-a de oktobro ĝis 1-a de novembro: **AŬTUNE**, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

Adreso: **MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 BAUGE-EN-ANJOU, France**

Telefono: **02.41.89.10.34**; Retpoŝto: **kastelo@gresillon.org**

Retejo: **gresillon.org**

SRILANKO LA MIRAKLO DE AZIO

Zeiter Perera



Srilankon oni facile imagas kiel tropikan insulon sude de Barato en Hinda Oceano. La plej granda diferenco inter Barato kaj Srilanko estas, ke la plimulto de loĝantoj en Srilanko estas budhanoj. La impresoj de **Marko Polo** estis, ke Srilanko estas la plej bela insulo en la mondo.

Srilanko havas ĉion, kion homoj bezonas. La marborda strio de strandoj ĉirkaŭ la insulo estas tiel bela, kiel nenie en la mondo. Por taksu la kulturon, oni devas nepre spekti la dancistinojn el **Kandio (Kandy)** aŭ procesion de elefantoj. Historiaj ruinoj ne mankas: sufiĉas vidi la antikvajn urbojn de **Anuradhapura**, **Polonnaruwa** kaj **Sigiriya**, kiuj altiras turistojn kaj famas tra la mondo. La naturo de Srilanko estas tre konservita. Parto de la monda heredaĵo fariĝis **Sinharaja pluarbaro**, kiu restis netuŝita de la popolo, kaj krome ekzistas multaj naciaj parkoj tra la insulo. La bonan impreson lasas ankaŭ la amikemaj homoj de Srilanko. En la lando ekzistas multaj lokoj pri kiuj cirkulas legendoj. Ĉu **Adam's peak** estas la loko kie Adamo surpaŝis la teron post restado en la edeno? La budhanoj kredas, ke Budho lasis sian piedspuron sur montopinto **Siripada**. Srilanko estis konata dum jarcentoj kiel **Lankadipa** kaj la Tamiloj nomis ĝin **Ilankei**. La Romianoj konis ĝin kiel **Traprobane** kaj la islamaj komercistoj nomis ĝin **Serendib**. Por Portugaloj ĝi estis **Ceilão**, por nederlandanoj **Ceyan** kaj por Britoj **Ceylon**. En 1972 ĝia

nomo ŝanĝiĝis al la origina nomo **Srilanka**. La insulo havas formon de larnguto kun longeco de 353 km kaj larĝeco de 183 kilometroj. La areo de la insulo estas 66.000 kvadrataj kilometroj.

La unua regno estis fondita en **Anuradhapura**, la seka norda regiono, en la 4-a jarcento a.K. Ĝin fondis la reĝo **Vijaya**. En la 3-a jarcento la granda budhana imperiestro **Aŝoka de Barato** sendis sian filon **Mahinda** por disvastigi budhismon en Srilanko. En la jaro 1948 Srilanko sendependiĝis de Britio kaj formis propran registaron. Nuntempe la lando estas sendependa respubliko kun sia prezidanto.

